

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 3 (88) junio 2015



en la numero

*EsPrimo-11: raportoj kaj impresoj
SEJM – iom da historio
UEA havas jam pli da membroj ol en 2014
problemoj de esperantista biografiaro
gratulversajo por Vladimir Samodaj
lerneja lingva festivalo en Kaluga
en Esperanto aperis poemoj de Wisława Szymborska*

Moskvo, 2015

enhavo

- 01 *Memorindaj eroj de EsPrimo-11 (V.Opletajev)*
- 05 *El la vidpunkto de la organizanto (R.Kudrjavceva)*
- 09 *La impresoj de partoprenintoj*
- 14 *SEJM – iom da historio (D.Cibulevskij)*
- 18 *Biografiaro de patrolandaj esperantistoj: problemetoj kaj solvoj (A.Sidorov)*
- 23 *Szyborska en “Oriento-Okcidento”*
- 24 *La 4-a Lerneja Lingva Festivalo en Kaluga (I.Gončarova)*
- 25 *Nova Ĝenerala Direktoro: tri kandidatoj intervjuotaj*
- 25 *Jesper Jacobsen gvidos IKU en Lillo*
- 25 *Biblioteka apogo Bachrich atendas subvencipetojn*
- 26 *Forpasis Antanas Mekys*
- 27 *UEA havas jam pli da membroj ol en 2014*
- 28 *“Mi stelojn jungis al revado...” (fragmento el nova romano de M.Bronštejn)*
- 39 *UEA eldonis duan kolekton de premiitaj eseoj*
- 40 *Versaĵoj de Nikolao Neĉajev*
- k3 *Fotoj de EsPrimo-11*
- k4 *Por la jubileo de V.V.Samodaj*



Raja Kudrjavceva dum Poezia horo en EsPrimo-11

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 3 (88) junio 2015
aperadas ekde 2000

redaktas Georgij Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

poŝta adreso: Pjaticnikoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio

retadreso: gazeto@mail.ru

abontarifoj por 2015:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ – 680 rubloj, sendantaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

aŭ pagendaj al: 410011382499386
en la pagsistemo “Яндекс.Деньги”

por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj
*pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

elektronika abono – 350 rub. (10 eŭr.)

MEMORINDAJ EROJ DE EsPrimo-11

EsPrimo-11 ofertis al ĉiu gasto abundon de elekteblaj aranĝoj el la oficiala programo, kiu daŭris dum ĉiuj festaj tagoj – en amikaj rondoj neoficiale ĝis postnoktomezo. Ĉiu havis proprajn preferojn pri elekto de ŝatataj temoj. Mi prezentas nun miajn impresojn pri la programeroj, kiujn mi partoprenis aŭ nur ĉeestis kiel observanto. Do ekzistis ja ankaŭ alia programtavolo, konsistanta el ludoj, konkursoj, dancoj, distraĵoj, noktaj babiladoj ktp. Sed pri tio eble povus raporti alia persono.



“La vojo, kiun ni sekvas”

La brazila muzikbando “Merlin” en sia populara kanto, refrene ripetante la linion, kiu iĝis la ĉeftemo de EsPrimo, kaj meditante pri la homa destino, rakontas, kiun vojon elektas esperantistoj: plenan de ŝtonoj, malfacilan, lernigan, nur unu vojon por la tuta vivo. La afiŝita programo de EsPrimo prefacis ĉiun tagan horaron per linioj el la fama klasika poemo de Ludoviko Zamenhof, aludante la misian vojon, kiun persiste sekvas esperantistoj de jam kelkaj generacioj:

*“Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.”*

Evidente la temo de EsPrimo-11 ne celis fundan historian, sociologian, lingvopsikologian aŭ aliajn eblajn analizojn de tiuj apenaŭ percepteblaj motivoj, kiuj direktas homojn al la vojo de Esperanto, sed ruĝfadene ĝi trais la tutan programon, reflektante diversajn etapojn de tiu ĉi vojo per vivospertoj de ordinaraj esperantistoj aŭ per elstaraj movadaj, literaturaj, instruaj atingoj de homoj, oferintaj sian vivon al la realigo de la ideo de Esperanto.

Peĉakuĉo

Ŝajne Peĉakuĉo iĝis nemalhavebla (sed ne rutina!) programa parto de EsPrimo. Jam la trian fojon ĝin lerte gvidis Aleksandr Osincev (Jekaterinburg). Aleksandr en sia prefaca instrukcia parolo antaŭdiris ekskluzive interesan programon, kaj li certe ne malpravus. Ĉi-foje estis prezentitaj kvin rakontoj, kies temaro, tre varia kaj kompilita laŭ la gustoj kaj preferoj de la raportintoj, ĝuigis aŭskultantojn, provokis plurajn demandojn kaj diskutojn:

Vladimir Opletajev (Surgut): “Aleksandr Saĥarov – centprocenta esperantisto”;

Katerina Arbekova (Novosibirsk): “Vojaĝo ... per metroo”;

Darja Zelenina (Ĉeljabinsk): “Kiel aspektus Esperanto, se ...? Proponoj pri ŝanĝoj”;

Artur Grigorjev (Krasnojarsk): “Eksterstrataj transirejoj”;

Daŝa Arbekova (Novosibirsk): “La junulara Japanio”.

Diskuttrondoj

La tri enprogramaj diskuttrondoj celis diskutigi partoprenantojn pri diversaj kaj tre malsimilaj problemoj, sed ĉiuj ŝatantoj de publikaj konversacioj havis ŝancon senĝene prezenti siajn ideojn kaj pensojn, interparoli kun malsamopiniantoj, interŝanĝi argumentojn.

La diskutrondo “Estas mi esperantisto”, gvidita de Vladimir Opletajev kaj Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg), laŭnome kopiis la faman samtitolan poemon de Julio Baghy, sed ĝi sukcese evitis ĝian ironian subtekston kaj iĝis tre vigla diskutejo por trakti plurajn sociologiajn temojn: kio estas nuntempe esperantisto, ĉu oni naskiĝas aŭ fariĝas esperantisto, kia estas vera / ideala / tipa esperantisto, kiujn “difektojn” (en la kunteksto de la populara kanto de Emanuele Rovere) havas nunaj esperantistoj, kiuj Esperanto-revoj obsedas la mensojn de esperantistaro... Ĉiujn ravis la vivspertita koncepto pri la esperantista destino de Irina Gonĉarova (Odincovo) kaj tre ilustraj kaj pensigaj rezonoj de Aleksandr Osincev pri la vivovojo de esperantistoj. Aparte ĉarman etoson ene de diskutpaŭzoj kromkreis la humuraj poemoj de Tatjana Vŝivceva (Miass).

Konstantin Ĥlizov (Irkutsk-Jekaterinburg) ne nur lerte paroligis kunvenintojn pri la temo “Kial ni kantas?”, sed fine, kolektinte sufiĉe bravan entuziasman ĥoron, ankaŭ sukcese kantigis eĉ tiujn, kiuj konsideris sin plene malkapablaj eligi koherajn sonojn.

La diskutrondon “Komunaj Esperanto-projektoj por kunagado” gvidis Irina Gonĉarova, prezentinta por pridiskuto ambician kaj ampleksan projekton, lanĉitan de MEA MASI, pri kreo de Esperanta fako en publika biblioteko kaj kontrakto pri diversbranĉa kunlaboro inter esperantistoj kaj bibliotekaj servoj. Evidentiĝis, ke en pluraj urboj de Rusio bibliotekoj, cetere por ne perdi jamajn legantojn kaj/aŭ altiri la novajn, volonte subtenas literaturajn iniciatojn flanke de diversaj sociaj unuiĝoj aŭ apartaj personoj, kaj esperantistoj povas utiligi tion kaj profiti el ĉi tiu bonŝanca kunlaborado.



Darja Zelenina

Por interŝanĝi spertojn, komuniki ideojn kaj praktikajn sugestojn pri ĉi tiu temo estos kreita laborgrupo en la socia reto “VKontakte”.

Darja Zelenina informis la ĉeestantojn pri pluraj funkciaj kaj partoprenindaj projektoj de “E&I”.

Prelegoj

La prelegserio estis ekskluzive interesa, ĉar prelegojn kaj raportojn prezentis kompetentaj homoj, kiuj amatore aŭ profesie dediĉas multan tempon al leksikografio, literaturo, lingvoedukado, movadaj problemoj.

Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburg) raportis pri “Grandaj Esperanto-vortaroj de Kondratjev”, signis etapojn kaj perspektivojn de ĉi tiu longjara kaj tre grava laborado de malgranda kolektivo, kiu bezonas subtenon kaj financon helpon.

Viktor Laptev (Ĉeljabinsk) okazigis “Prezentadon de IER-vortaro”, kiun li estis verkanta kaj kompilanta dum kelkaj jaroj.

Darja Zelenina (Ĉeljabinsk) en sia brila raporto “Denaskuloj: kiel tio funkcias?” traktis el la kogna vidpunkto la evoluon de plurlingvuloj kaj prezentis multajn interesajn sciencajn faktojn kaj praktikajn rekomendojn al tiuj, kiuj volas eduki denaskajn Esperanto-parolantojn.

Vjaĉeslav Roĵdestvenskij (Ĉeljabinsk) prelegis pri “Urala verkisto Valentin Lukjanin”, kies patro estis esperantisto kaj kiu en sia biografia libro dediĉis tutan ĉapitron al Esperanto.



Aleksandr Osokin

Vladimir Terjoĥin (Jekaterinburg) rakontis pri “La Studenta konstruataĵo (SKT-2)”, kiun li mem organizis kaj gvidis en 1971 en la vilaĝo Svetlaja Poljana de Novosibirska provinco. Ĉiuj estis surprizitaj de la arkiva dokumenta filmo, filmita antaŭ pli ol 40 jaroj de Novosibirska televido. En la dudekminuta filmo estas detale prezentita unu somera tago el la vivo de la 55-persona esperantista taĉmento.

Poeziaĵoj

Du poeziaj prezentaĵoj estis replikoj al la temo de la renkontiĝo, ĉar ili konigis faktojn el la esperantista biografio kaj vivovojo de poetoj, kaj ili iĝis samvalore ankaŭ inda omaĝo al la Jaro de literaturo en Rusio.

Irina Gonĉarova kun teameto de diversurbaj poeziŝatantoj prezentis versaĵojn el la poemkolekto de Mikaelo Giŝpling “Vespere”. Sonis lirika ver-

saĵoj pri naturaj sezonoj akompanate de fotaj reproduktaĵoj de klasikaj rusaj pentraĵoj kaj bela muziko.

Raja Kudrjavceva, fascinita de la amliriko de ĉeĥa poetino Eli Urbanová, volonte konatigis spektantojn kun ŝia verkaro kaj kune kun samklubanoj el Jekaterinburg deklamis kelkajn belajn poemojn.

Ambaŭ scenoj intrigis por atentigi spektantojn pri la aŭtoroj, kies talento kaj poeta esprimforto estas nesubtakseblaj, kaj espereble iu, reveninte hejmen, ekdeziros kaj trovos tempon por relegi iujn el la aŭskultitaj poemoj.

Ĉeljabinsk

En Esperanto pri la urbo Ĉeljabinsk oni povas legi en la informa artikolo de Viktor Laptev kaj Vjaĉeslav Roĵdestvenskij, afiŝita en la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado” <<http://ural-sib.org/eo/la-urbo-cxelabinsko-skiza-historio>>.

La 4-an de majo pli ol 20 partoprenintoj de EsPrimo-11 aliĝis al kelkhora busekskurso por pli bone ekkoni la urbon, kiu, jam antaŭfeste flegita kaj lavita de freŝigaj printempaj pluvoj, kovris sin per verda foliaro kaj antaŭĝuis la 70-an datrevenon de la Granda Venko. Ĉeljabinsk inter pluraj uralaj urboj per neimageblaj laborstreĉoj de aĝaj homoj, virinoj, adoleskuloj, laborintaj en malfrontaj milituzinoj, senlace forĝis la armilan bazon por la venko en la Granda Patrolanda milito. Meritplene ĝi tiam estis nomata Tankograd (“Tankurbo”).

Esperantistoj traveturis posttagmeze la festan urbon, vizitis la belegan ripozparkon “Jurij Gagarin”, establitan surloke de iamaj marmorminejoj, konatiĝis kun milita tekniko, ekspoziciita en la Parko de la Venko, promenis tra la piedira pasejo “Kirovka”, estis impresitaj de la luksa, moderne ekipita regionografia muzeo, kolektinta artefaktojn kaj rarajn dokumentojn kaj objektojn el diversaj epokoj, spektis videon pri la Ĉeljabinska meteorito kaj povis vidi tiun 500-kilograman kosman gaston – meteoritan ŝtonon, falintan en la lagon Turgojak kaj nun lokitan en vitran muzean ŝrankon.



Viktor Laptev

Vladimir Opletajev (Surgut)

EL LA VIDPUNKTO DE LA ORGANIZANTO

EsPrimo (Esperantista Primavera) estas ĉefa Esperanto-evento de la jaro en la ural-siberia esperantista movado. Ĉi-jare ĝi okazis la 1-an – 4-an de majo, la unuan fojon en la urala urbo Ĉeljabinsk, kaj kunvenigis tie 58 esperantistojn el 13 urboj de Rusio. Nun, rememorante, analizante, komparante ĝin kun niaj antaŭaj EsPrimoj, mi povas konstati, ke nia tradicia regiona renkontiĝo sukcesis.

Verdire, kiel unu el la organizantoj de EsPrimo-11, mi ne atendis tiun sukceson. Kial? Eble tial, ke dum pluraj jaroj ĉeljabinskaj aktivuloj malkuraĝis akcepti la defion organizi EsPrimon en sia urbo. Sed delonge kaj arde deziris, ke tio okazu, novosibirska esperantistino Katerina Arbekova. Ĉeljabinsk estas la naskiĝurbo de Katja, sed ŝi forlasis ĝin en dumonata aĝo kaj neniam poste vizitis la urbon. Ŝi nur revis organizi tie EsPrimon. Komence de tiu ĉi jaro, tuj post la jarŝanĝaj festoj, Katerina telefonis al mi kun la iniciato fari EsPrimon-11 en Ĉeljabinsk kaj montris sian pretecon komenci la preparadon. Granda ŝia entuziasmo ekflamigis ankaŭ min, kiu komencis krei organizan teamon de la renkontiĝo. Ja mi scias, ke bona teamo estas jam duono de sukceso. En la organizan teamon eniris la plej agemaj aktivuloj el diversaj ural-siberiaj urboj, eblas diri “fermentilo” de la regiona Esperanto-movado: Katerina mem el Novosibirsk, Darja Zelenina el Ĉeljabinsk, Aleksandr Osincev el Jekaterinburg, Pavel Veselov kaj Marina Stepaĉova el Tjumenj, Roman Jefremov el Glazov. Estis vere agrable kunlabori en tiu “brila stelaro de rava junularo”, ĉar ĉiu el ili aliris al sia tasko tre respondece kaj samtempe tre kreeme. Multe helpis al ni, per interesaj ideoj kaj proponoj kaj ankaŭ per realaj aktivaĵoj dum la aranĝo, nia sperta amiko Vladimir Opletajev, kun kiu mi persone ŝategas kunlabori.

Ĉiuj niaj EsPrimoj – diversaj, malsimilaj – estas ne monokromataj, sed tre koloriĉaj, buntaj. Kaj certe ili evoluas enhave. Mi memoras, ke la unuaj renkontiĝoj havis pli simplan programon, kiun partoprenis plejparte plej kuraĝaj aktivuloj (tiaj estis EsPrimo-1 kaj EsPrimo-3, ambaŭ okazintaj en Toboljsk). Foje renkontiĝoj havis gaste tiujn brilajn personojn, kiuj per



sia veno kaj partopreno pliriĉigis la programon (tiel okazis dum EsPrimo-2 kaj EsPrimo-10 en Jekaterinburg, kiam partoprenis Mikaelo Bronŝtejn; dum EsPrimo-4 en Tjumenj, por kies programo multe kontribuis Aleksandr Melnikov; kaj dum EsPrimo-5 en Jekaterinburg ni havis tiom da brilaj gastoj: Georgo Handzlik el Pollando, Mikaelo Bronŝtejn, Georgij Kokolija, Aleksandr Melnikov!). Ankaŭ ĉi-foje ni atendis venon de Jefim Zajdman el Jalto, kiu planis multon kontribui al la programo de EsPrimo-11. Sed kiam okazis, ke li ne povas veni pro gravaj kaj kompreneblaj kialoj, mi ekvidis en nia programo multajn truojn loke de la planitaj programeroj de Jefim. Feliĉe, estis granda elekto el la proponoj de aliaj partoprenontoj, kio por mi estas indiko de kreskinta aktiveco de la regiona esperantistaro. Kaj mi fidas, ke nun ni kapablas nur per fortoj de niaj esperantistoj-samregionanoj



krei interesegan, varian, enhavriĉan, pensigan programon. Tiel estis dum EsPrimo-7 en Toboljsk, EsPrimo-9 en Tjumenj kaj ankaŭ dum tiu ĉi EsPrimo-11 en Ĉeljabinsk.

Nia ĉefa gastino ĉi-foje estis Primavera mem. Dum ĉiuj renkontiĝaj tagoj regis vere bela printempo kaj pure Esperanta spirito. La vetero, eblas diri, nin dorlotis: la ĉielo mirinde bluis, la suno malavare brilis, en la bazejo blovis vento de amikeco kaj vento de inspiro. Kaj fakte sur-

ronde de tiu komuna printempa humoro, ĝojo, ĉies entuziasmo kaj aktiveco estis tre intense travivitaj tiuj kvar majaj tagoj. La plej ĝenerala mia impresio, kiu restis post tiu ĉi renkontiĝo: ke tio estis tre-tre bona...

Estas bonege, ke ni ĉiuj havis oportunojn paroli la lingvon; partopreni viglajn, neenuajn diskutojn; ĝui interesegajn prelegojn kaj prezentadojn; lakone esprimi sin dum Peĉakuĉo; konkursi en interpretado kaj en sportaj ludoj; kunridi dum Gaja Vespero; kunludi dum *Brain-ringo* kun Roman Jefremov kaj en multegaj noktaj ludoj; kunkanti kun Konstantin Ĥlizov dum la diskutrondo “Kial ni kantas?”; kundanci kun Marina Stepaĉova dum Gajaj Dancoj; kundeklami la poeziaĵojn de Giŝpling kaj Eli Urbanová; kunkrei mirinde belan komunan koncerton en la lasta vespero de la renkon-

tiĝo. Mankis loko por enuo, kaj mi ne vidis ĉirkaŭ mi eĉ unu mornan vi-zaĝon!

Por mi mem EsPrimo ĉiam estas tiu spaco, kie iel alie batas mia koro, mi komencas eĉ senkiale rideti, sentas min tre komforte, leĝere... En tiu ĝoja etoso kaj amika medio ĉio malbona degelas kiel printempa neĝo kaj oni komencas alie pensi, kaj la mondo, kiu eble antaŭe estis griza, povas akiri tiom ĝojajn, helajn kolorojn.

Min ĉiam ege ĝojigas harmonia kunestado de diversaj E-generacioj; ekvilibro inter gejunuloj, kun ilia impeto, pasia strebo al io nova, ankoraŭ neokazinta – kaj jam multon vidintaj kaj spertintaj esperantistoj, gardantoj de E-tradicioj kaj la kluba historio. Spertuloj (Viktoro Laptev, Vjaĉeslav Roĵdestvenskij, Galina Terentjeva) ankaŭ ĉi-foje rakontis pri la historio de la klubo, revivigante la pasintecon, ja ĝuste la 1-n de majo ĉeljabinska E-klubo festis sian 45-jariĝon, aŭ montris, kiel Vladimir Terjoĥin, bonegan filmeton pri Esperantista konstrutaĉmento, kiun li organizis en 1971 en Novosibirsk. Sed niaj spertuloj ne aspektis kiel gravuloj, ĉe ili forestis bombasto kaj graveco, ili estis tre kontaktemaj, amikemaj, afablaj. Kaj niaj gejunuloj estis ŝercemaj, gajaj, ludemaj, aldonis junan, freŝan energion al EsPrimo-11. Sed ili ankaŭ ne restis indiferentaj, tre estime rilatis al niaj E-veteranoj, scivole ensorbante ĉion, kion ili rakontis. Mi nur povas aserti, ke ĝuste en tiu medio, en pozitiva unuiĝo de E-generacioj, junuloj rapide kreskas kiel interesaj Esperanto-personoj.

Ankoraŭ unu ĝojiga fakto, pri kiu mi ne povas silenti: tre bonas, ke niaj esperantistoj venas al EsPrimoj kun la familioj kaj siaj infanoj; kelkajn el ili ni povis observi dum jaroj, kiel ili kreskis, ŝanĝiĝis: nun jam la 15-jaran Anja Pavlova, 12-jaran Filipp Vŝivcev, 9-jaran Sofija Paŝĉenko – ili ĉiuj partoprenis jam ne la unuan EsPrimon, bone komprenas kaj diversgrade parolas Esperanton. De la unua vivojaro partoprenas EsPrimojn Artjom Velselov. Ĉi-foje aliĝis la familio de Konstantin Ĥlizov kun du simpatiaj filinoj: Aljona kaj Alisa; kaj la familio de Konstantin Obrazcov kun la ĉarma filo Leo, nur 1 jaron kaj 8 monatojn aĝa, – la plej juna nia partopreninto, kiu tute ne kapricis, nature ĉeestis ĉiujn aranĝojn, kvazaŭ li naskiĝis jam en



Marina Stepaĉova kaj Aleksandr Osincev dum Gajaj Dancoj



Sofija Paŝĉenko

tiu ĉi medio. Fakte ĉiuj infanoj sentas sin dum EsPrimoj hejme, ofte aktivis dum komunaj koncertoj, kaj ankaŭ ĉi-foje ili preparis sian programeton dum la koncerto. Min mem ĉiam ravas nia neripeteble varma, familia etoso, en kiu ni kuniĝas kaj kiun ni, kiel organizantoj, strebas krei. Evidente ni sukcesas en tio, kaj mi fieras, ke dum EsPrimo-10 en Jekaterinburg mi estis premiita per Verda Horloĝo ĝuste pro la kreado de familia etoso dum EsPrimoj.

Se demandi, kio ankoraŭ ĝojigis min dum tiu ĉi EsPrimo, mi povas respondi: pli vasta partopreno ĉi-jare de siberiaj esperantistoj – estis ne nur novosibirskanoj, sed ankaŭ esperantistoj el Tomsk, Krasnojarsk, Irkutsk, kiuj sufiĉe malproksimas de Ĉeljabinsk. Ni ankaŭ estis tre ĝojaj vidi E-gastojn el same foraj urboj: Volgograd (Tatjana Vtorova kaj Valentina Spicina), Arĥangeljsk (Larisa Ŝapoŝnikova), Sankt-Peterburg (Aleksandr Osokin), Dimitrovgrad (Tatjana Ilutkina, Irina Ruzankina, Jelena Ĉernova). Ege ni ĝojis, ke denove venis niaj amikoj-MASI-anoj (Irina Gonĉarova kun sia glora junularo). Venio de tiom da aliurbaj gastoj estas por mi indiko de la populareco de niaj regionaj renkontiĝoj! Ĉiuj niaj gastoj, senescepte, estis tre printempe agorditaj kaj tre aktive kontribuis al la programo de EsPrimo-11. Ni tre dankas vin, gekaraj!

Estis multo interesa kaj diversa en tiu etosplena programo. Tio ne priskribeblas, ĉar tion necesas vidi, partopreni en tio! Tial mi eĉ ne priskribu la detalojn. Por mi tre valoras, ke ni ne simple kunvenas: ni komuniĝas, interŝanĝas opiniojn, klerigas unu la alian, interamikiĝas. Mi ĝojas kaj kontentas, ke tio okazis. Ni esperu, ke tio ankoraŭ okazos kaj EsPrimoj daŭre estos.

Kaj fine mi diru nur kelkajn frazojn pri la elektita ĉi-jara temo: “La vojo, kiun ni sekvas”. Certe, ĉiu el ni havas propran vivon kun siaj agrablaĵoj kaj malagrablaĵoj, kaj en ĝi sian apartan vojon, sian biografion, kiu sendube lasas postsignon je nia tuta mondopercepto. Sed nin kunigas ja unu komuna vojo, sur kiu ni paŝas – Esperanto-vojo. Iuj el ni jam delonge paŝas sur tiu ĉi vojo, iuj estas nur ĉe la komenco. Sed ĉiuj ni devas daŭrigi nian paŝadon, ĉar se ni haltos surloke – jam nenio okazos, kaj ĉio rapide malaperos. Ni esperu je plibono, al alio mi simple ne pretas...

Raja Kudrjavceva, ĉefa kunordiganto de EsPrimo-11 (Jekaterinburg)

BELEGAJ TAGOJ ĈI

la impresoj de partoprenintoj

Legante en REGo artikolojn pri EsPrimo, ni ĉiam ĝojis pri interesaj ura-laj aranĝoj, kiujn ni revis partopreni. Kaj jen ĉi-jare nia revo realiĝis.

Nia duopo atingis la hotelon “Solneĉnaja” en Ĉeljabinsk frumatene la 1-an de majo. Restis 2 horoj antaŭ registriĝo. Bonega suna vetero vokis nin en la apudan vastan parkon. Reveno en la hotelon similis renkonton kun tre proksimaj parencoj – gajaj voĉoj, kisoj, brakumoj. Tia amika, ĝoja kaj samtempe trankvila etoso konserviĝis dum ĉiuj tagoj de EsPrimo.

Tuj post la tagmanĝo komenciĝis prezento de organizantoj kaj salutoj de gastoj. Parolante laŭvice, ĉiuj ricevis amuzajn taskojn de gvidantino. Estis gaje kaj interesege ankaŭ dank’ al kelkaj ŝerculoj, kiuj ankaŭ poste ĉiam plibeligis aranĝojn – Vladimir Minin kaj Konstantin Obraczov el Tomsk, Roman Jefremov el Glazov.

La programo estis tre varia kaj riĉa, kelkajn programerojn oni gvidis eĉ paralele. La plej plaĉaj por ni estis “Peĉakuĉo” (Aleksandr Osincev), la diskutrondo “Estas mi esperantisto” (Vladimir Opletajev kaj Raja Kudrjavceva), “Gaja vespero” kaj “Gajaj dancoj”, brile kaj pacience gviditaj de Marina Stepaĉova el Tjumenj. Tiu lasta estis tre interesa, ĉar Marina surmetis robojn konforme al la epoko, al kiu apartenis tiu aŭ alia danco. Arte faritaj belegaj roboj kaj dancmovoj kreis neripeteblan atmosferon, kaj ĉiuj volonte lernis anglan kaj irlandan dancojn.

Kun granda intereso ni plonĝis en la pasintecon dum la rakontoj de Viktor Laptev kaj Vjaĉeslav Rojdestvenskij pri la historio de la esperantista movado en Ĉeljabinsk kaj dum prezento de la filmo pri esperantista konstrutaĉmento en 1971 fare de Vladimir Terjoĥin (Jekaterinburg). Utilis certe prelegoj pri rimvortaro de Viktor Laptev kaj pri la vortaroj de Kondratjev (Aleksandr Osokin el Sankt-Peterburg).

Personoj estis rimarkindaj ĉi tie. Bonege aktivis Katerina Arbekova kaj ŝia filino Daŝa, la amikema Roman Jefremov, intelektulo Vladimir Opletajev, kies libron “Simboloj de Rusio” ni ĵus aĉetis. Raja Kudrjavceva similis reĝinon: aferema, ĉion scianta, ĉiujn helpanta,



ĉien impetanta, trovanta nur bezonatajn ĉi-momente vortojn. Krom tiuj kapabloj, ŝi montriĝis tre romantika kaj virineca dum la vespero, dediĉita al E.Urbanová. Impresis nin ŝia legado, kandeloj sur la tablo... kaj ŝika skarpo en ŝiaj manoj.

La tagordo estis saĝe organizita, sen malfruoj kaj prokrastoj, kaj la lingva disciplino mirigis nin – evidentis, ke la partoprenantoj plezure parolis la lingvon. Bedaŭrinde, ni ne partoprenis la ekskurson tra Ĉeljabinsk, ĉar ni forveturis pli frue, sed mi ne dubas, ke ĝi estis same bone kaj bele organizita. Ho, kiel rapide pasis belegaj tagoj ĉi! Dankon al la mastroj kaj al ĉiuj aktivuloj! Ĝis venonta EsPrimo!

Tatjana Vtorova kaj Valentina Spicina (Volgograd)

Nia kvaropo, plena de feliĉaj kaj ĝojaj pensoj revenis al Moskvo de EsPrimo – tradicia aranĝo, kiun jam la 11-an fojon organizis uralaj kaj siberiaj esperantistoj por ĉiuj dezirantoj. Ĉi tie mi proponas al vi propran mallongan raporton pri la okazintaj eventoj kaj miaj impresoj.

Partoprenante en la Aŭtuna lingvotrejnado novembre de 2014 en Jakaterinburg, mi konatiĝis kun bonegaj homoj kaj jam tiam decidis, ke, se eblos, mi nepre partoprenos ĉi tie alian esperantistan aranĝon. Tial, kiam Raja Kudrjavceva invitis nin, mi inter unuaj homoj aliĝis, pagis monon kaj aĉetis trajnbiletojn. Proksimiĝis la destina dato, ankaŭ kelkaj homoj el MASI decidis kunvojaĝi, la aliaj male – rifuzis, malgraŭ alloga ebleco plibonigi sian lingvon, observi novajn lokojn, konatiĝi kun plaĉaj homoj. Ni decidis veturi per trajno kaj utile uzi tempon dum la vojo.

La 29-n de aprilo vespere ni envagoniĝis. Nin akompanis ĉe la staci-



domo kvar moskvaj esperantistoj: Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko, Svetlana Smetanina kaj Julija Samsonova. Ili diris porvojan bondezirojn kaj anime adiaŭis. En ĉi tiu dato estis la naskiĝtago de Kuzjma Smirnov, li 18-jariĝis! Ni havis iom da manĝaĵoj kaj torton. Ni festis kaj donacis al li diversajn agrablajn bagatelaĵojn, gratulis lin. Poste ni kartludis, instruis en Esperanto al Kuzjma novan kartludon. La sekvan tagon en la trajno ni pasigis tre gaje, manĝis,

dormis, ludis, babilis, deklamis poeziaĵojn por EsPrimo, ŝercis, ridis. Vojaĝi kvarope en unu kupeo estas tre agrable. En la vagono kun ni veturis armeaj kursanoj ĝis Ufa, tial estis bruo kaj rumoro. Ni venis en Ĉeljabinsk-on frumatene la 1-an de majo. La vetero estis bonega, brilis la suno, sen-nubis, ne varmis. Ni sidigis en la stacidoma kafejo, atendante aliajn gastojn. Venis Roman Jefremov el Glazov. Evidentiĝis, ke en Ĉeljabinsk samtempe okazis go-turniro, kaj Roman kiel pasia go-ludanto volis ĝin partopreni. Ni lasis niajn aĵojn en la hotelo kaj dum kelkaj horoj promenis en la urbo. La urbo estas tre bela, kun larĝaj stratoj kaj pura aero. Ni promenis tra la piedira pasejo “Kirovka” simila al la strato Arbat en Moskvo, aĉetis donacojn, observis la manifestacion okaze de la maja festo. Poste per aŭto ni revenis al la hotelo.

Dum la malfermo de EsPrimo mi vidis multajn diversurbajn kaj diversajajn homojn. Tio estis kaj plaĉa, kaj mirinda: ja mi pensis, ke mi jam konas ĉiujn post la Lingva trejnado. Ĉiuj estis tre diversaj, sed unuigas ĉiujn Esperanto, entuziasmo, aktiveco kaj neprofitemo. Poste ni ludis, parolis, teumis kaj manĝis. Ni dormiĝis tre malfrue, ĉar ĉiuj tre volis neformale interkomunikiĝi. En la dua tago Irina Gonĉarova rakontis pri la projekto “Библиотека в библиотеке” – pri tio, ke oni devas kunlabori kun urbaj bibliotekoj, fari aranĝojn en ili, popularigi Esperanton kaj plenigi iliajn ŝrankojn per Esperanta literaturo. Ŝi raportis pri tio, kion MASI jam praktike realigis. Estis multe da aliaj interesaj programeroj, diverstemaj prezentaĵoj, konkursoj, filmoj, ludoj kaj dancoj. Ĉe mi jam aperis preferoj, kaj mi povas diri, kio al mi pleje plaĉis. Tio estas la interpreta konkurso, komuna koncerto, lingvaj kaj societaj ludoj. Malmulte da tempo oni havis por amika kunparolado, ĉiam okazis iuj laŭplanaj programeroj.

Tio estis mia tria E-aranĝo, kaj mi povas diri certe, ke mia Esperanto pliboniĝis. Mi volas danki la organizantojn pro tio, kion ili faris, faras kaj, mi esperas, faros. Dio donu al ili sanon, multe da fortoj kaj eblecon veni al ni por moskvaj aranĝoj.

Aleksandr Ba-
sov (Ljuberci)



La etoso de EsPrimo ege plaĉis al mi. Mi tre ĝojas, ke en Uralo estas tia forta teamo por organizi renkontiĝojn de esperantistoj. Dum la tuta aranĝo mi strebis viziti tiom da programeroj, kiom eblis. Ĉiuj programeroj plaĉis al mi, kaj mi volas noti iujn eventojn, kiujn mi memorfiksis aparte. Kompreneble, tio estas mia subjektiva opinio. La rakonto de Aleksandr Osokin pri la E-vortaroj de Kondratjev tre interesis min. Mi ne esperis renkonti homon, kiu aktive partoprenas en la kreado de E-vortaro. Mi uzas la vortaron preskaŭ ĉiun tagon, ĝi estas mirige utila. Ankaŭ mi kaj Aleksandr interkonsentis, ke mi helpas teknike lin pri la vortaro. Krome interesa rakonto estis pri la inversa Esperanto-vortaro de Viktor Laptev. La ideo inversigi vortojn, por facile trovi rimojn, estis nova por mi. Ankaŭ la diskutrondo “Estas mi esperantisto”, gvidita de Vladimir Opletajev kaj Raja Kudrjavceva, estis tre interesa, ĉar ĝi konatigis min kun klasikaj temoj de Esperantujo. Dum la diskutado mi eldiris mian opinion, kial Esperanto estas bezonata k.t.p. Kun plezuro mi aŭskultis historiojn pri E-poetoj Giŝpling, Urbanová kaj pri la urala verkisto Valentin Lukjanin. Roman Jefremov gvidis interesajn ludojn, inkluzive de la go-ludo. Kaj Darja Zelenina rakontis tre sperte pri denaskuloj, parolantaj kelkajn fremdajn lingvojn. Dankon al la organizantoj pro kunvenigo de bonaj homoj dum EsPrimo-11!

Ilja Muravjov (Moskvo)

Vasta geografio de la partoprenintoj atestas, ke ĉi kunveno estas stabila kaj bone organizita, kaj EsPrimo havas estonton. Junaj komencantaj esper-



antistoj jam sufiĉe vigle parolas kaj bone komprenas. Interesa momento: kelke da geedzoj venis kun infanoj. Tamen la infanoj tute ne malhelpis la programon, ili nature eniris en ĉiun eron. Multaj eroj de la programo helpis al ni studi per Esperanto ion novan por ni. Al mi tre plaĉis interesaj programeroj de Roman Jefremov el Glazov kaj de Konstantin Obrazcov el Tomsk. Mi komprenis, ke ĉiu partoprenanto povas esti mastro de iu parto de nia kunveno. Dum EsPrimo mi ekvidis novajn formojn de E-movado kaj rememoris la malnovajn. Bona estis Amika vespero.

Renkontiĝu ni sekvajare!

Vladimir Terjoĥin (Jekaterinburg)

Saluton el Jekaterinburg, karaj geamikoj!

Pardonu min pro mia iom malfrua reĉo, sed ankaŭ mi volas danki ĉiujn organizantojn kaj ankaŭ la partoprenantojn de EsPrimo en Ĉeljabinsk pro la tre enhaviĉa kaj ĝoja renkontiĝo! Ĝia organizado, laŭ mi, estis senriproĉa, la programo tre varia kaj alloga, la etoso festa kaj tre varma!

Mi ŝatus aparte kun dankoj mencii: Raja Kudrjavceva kaj Mirina pro la mirindaj poeziaj programeroj, en unu el kiuj mi mem eĉ partoprenis plezure; Vladimir Opletajev pro la prezento de lia originale verkita en Esperanto libro “Simboloj de Rusio”, laŭ mi, tre bezonata kaj leginda; Vjaĉeslav Roĵdestvenskij pro lia interesa rakonto pri la verkisto kaj ĵurnalistoj Valentin Lukjanin, kiu, mirinde, estas nia samurbano; Daŝa Zelenina, Roman Jefremov kaj Aleksandr Osincev pro la klerigaj kaj atentokaptaj okupoj por novuloj kun multaj allogaj ludoj; Katerina kaj Daŝa Arbekova pro gajaj sportaj konkursoj; Marina Stepaĉova pro la instruado de graciaj historiaj dancoj; Tatjana Glaznica pro la tre utila spirgimnastiko, kiun mi volonte partoprenis ĉiumatene; Marina Stepaĉova pro lerte gviditaj amuzaj kaj ĝojaj vesperaj programoj: Amika vespero kaj Gaja vespero; Konstantin Ĥlizov pro la interesega diskutrondo pri muziko kaj kantado kaj pro la belega fina komuna koncerto! Ĉiuj menciitaj supre progameroj estis por mi tre interesaj kaj multe plezurigis min, dankon! Kaj ekskurso tra Ĉeljabinsk la 4-an de majo estis bonega finalo de la programo, pro kiu mi volas aparte danki ĝian organizanton Tatjana Glaznica! La urbo Ĉeljabinsk vere impresis min!

Mi certe tre ĝojis vidi dum la renkontiĝo miajn jam malnovajn E-amikojn, sed ankaŭ plezure konatiĝis kun la novaj, interesaj kaj talentaj homoj el diversaj urboj.

EsPrimo-11 lasis tre helan spuron en mia animo, kaj mi longe memoros ĝin! Dankon!

amike,
Aleksandra Osipova (Jekaterinburg)



Vjaĉeslav Roĵdestvenskij

SEJM – IOM DA HISTORIO

Ĉu kredi aŭ ne
kredi? Oni

memorigis al mi –
ĉi-jare estas la 50-
jariĝo de SEJM!
Por nova generacio
de esperantistoj
eble ne estas bone
konata (aŭ tute ne
estas konata), kio estas SEJM, kion signifas tiu siglo. Do, ni provu
rememori...



APERO

En 1965 laŭ iniciato de **Anatolo Gonĉarov** (tiam li loĝis en Barnaul –
Altaja regiono) estis farita la unua provo de interurbaj kontaktoj de junaj
esperantistoj-aktivuloj¹. En tiu jaro **A. Gonĉarov** dissendis tra la lando
alvokon reprezentiĝi ĉe “**Adresaro**” – la unua formo de la kunlaboro.

Tiun unuan Adresaron, aperintan fine de la jaro, eniris 18 grupgvidantoj
kaj unuopuloj ĉefe el Rusio kaj Ukrainio, kiuj reeĥis pozitive al la alvoko.
Per la Adresaro estis starigita unua kontakto en la landa skalo.

Paralele vigliĝis
regionaj E-movadoj –
la baltaj respublikoj,
kiuj kelkajn jarojn jam
organizadis komunajn
E-tendarojn; okcident-
siberianoj...

Komence de 1966
jam formiĝis “**Estraro
de Adresaro**” –
A. Gonĉarov (Barnaul),
V. Samodaj (Moskvo),
B. Kolker (Kiŝinev).

Poste en la sama jaro kooptiĝis ankoraŭ **M. Ŝevĉenko** (Ustj-Kamenogorsk),
V. Bepalov (Soĉi), **V. Ŝilas** (Vilnius).



¹ Mi neniel volas malpligravigi ĉiujn intencojn de esperantistoj-veteranoj, sendube
farintaj similajn provojn, kiuj finfine influis aperon de alia organizaĵo – ASE.

En la sama
 jaro 1966 tiun
 novan
 kolektivon laŭ
 propono de
**Vladimir
 Samodaj** oni
 komencis nomi
**SEJM – Sovetia
 Esperantista
 Junulara
 Movado.**



Jaroslav Matovič (Kievo) gvidas kurson por komencintoj dum SEJT-11 (Karpato, Slavsko, 1969)

Fakte el ĉio

supre menciita oni povas konkludi: kaj la jaro 1965, kaj la jaro 1966 povas esti la naskiĝjaro de SEJM (en 1965 aperis kolektivo de aktivuloj; en 1966 aperis SEJM kiel organizaĵo¹). Oficiale SEJM neniam estis **“organizaĵo”**. Sed efektive...

Somere 1966 en Apudmoskvo okazis fonda renkontiĝo de SEJM. Tiu ĉi renkontiĝo (oni ĝin nomis ankaŭ laborkunsido de la Estraro kaj aktivuloj de SEJM), kiu okazis la 16-an – 18-an de junio 1966 en apudmoskva ripozloko, estis pli organiza, labora ol ripoza.

Dum ĝi okazis ankaŭ elektoj de la Estraro kaj Komitato de SEJM. En la Komitaton de SEJM estis elektitaj jenaj aktivuloj: **V.Bespalov, V.Bobin, A.Gonĉarov, J.Zajdman, A.Jauŝkin, B.Kolker, S.Kotljarov, H.Ojasild, A.Pavlukovec, V.Samodaj, M.Ševĉenko, V.Ŝilas, J.Perevertajlo**. Anoj de la Estraro estis **A.Gonĉarov, B.Kolker, V.Samodaj, M.Ševĉenko, V.Ŝilas**. Fakte tio estis la unua SEJM-Komitato.

La unuan projekton de SEJM-Statuto ellaboris **Boris Kolker** laŭ skizoj de **V.Samodaj**, ĝi estis profunde studita, pridiskutita kaj akceptita.

Oni decidis ankaŭ, ke reelekto de SEJM-Komitato okazu ĉiujare dum seminarioj enkadre de someraj E-tendaroj.

STRUKTURO

Kape de SEJM estis SEJM-prezidanto, kiu koordinis la tutan laboron. Al li helpis kelkaj vicprezidantoj, kiuj respondecis pri internaciaj (eksterlandaj) kontaktoj, pri propagandaj aferoj (tiu ĉi agaddirekto poste nomiĝis **“(ekstera) informado”**, ĉar la vorto mem **“propagando”** sonis, por

¹ Ĉi tie mi ŝatus substreki, ke jure SEJM ne estis oficiala organizaĵo, ne havis sigelon, nek “patronojn supre”. Tiuperiode se ne estis iu superulo, kiu subtenus onin, praktike ne eblis normale ekzisti kaj agi.



diri milde, ne bele), pri sekretariaj aferoj, pri tendaroj kaj renkontiĝoj, pri financaj aferoj... Ankaŭ estis pluraj fakoj – bibliografia, magnetofona, kolektanta, metodika kaj multaj aliaj. Kiel estas notite pli supre, la reelektaj okazadis

ĉiujare. Kaj se iu gvidanto (ĉu vicprezidanto, ĉu fakestro) ne tre bone plenumis siajn devojn, oni rapide povis tiun personon anstataŭi per iu pli inda.

AGADO

Per kio tiom alloga estis SEJM? Se ni rigardu la agaddirektojn, ni povas vidi, ke eble la ĉefa celo en la agado estis popularigo kaj disvastigo de Esperanto en ĉiuj tavoloj de nia socio. Memkompreneble, post tre “peza” periodo en la vivo de nia lando, periodo de suspektado, kiam homoj estis ne tro “malfermitaj” por aliaj, ili ne tiom bonanime povis akcepti la ideojn de internacia lingvo, de la lingvo, kiu estis persekutata dum Stalin-periodo. Kaj pro tio la agaddirekto “*propagando*” poiome estis reformita je la “*informado*”.

Alia same tre grava estis la agaddirekto por profundigo de la lingvo-posedo – al tio tre helpis konstantaj diversnivelaĵoj kursoj, ĉiujaraj Esperanto-tendaroj kaj pluraj renkontiĝoj (ankaŭ dum la tendaroj okazadis kursoj), popularigo de Esperanto-literaturo kaj instigo ne nur havi la librojn en



D. Armand kaj S. Podkaminer kun H. Tonkin en Leningrad, 1973.

Esperanto, sed ankaŭ legi Esperante, vastigi korespondadon kun esperantistoj el aliaj landoj...

Vere grava agaddirekto estis “*interna informado*”, alivorte informado de esperantistoj pri okazigitaj kaj okazigotaj E-aranĝoj, pri novaĵoj en la E-vivo. Al tio multe helpis regule eldonata tiuperiode kelkpaĝa

ĉiumonata periodaĵo (preparata tajpe) “*Juna esperantisto*”, kiun sekvis “*Akordo*” kaj “*Aktuale*” (ankaŭ tiuj estis ĉiumonate eldonataj).

Ĉi tie nepre necesas mencii, ke ĝuste en SEJM estis organizita kaj vaste uzata agadformo “*Socialisma konkurado*”, kiu multe helpis poste al evidentigo, kiuj el la E-klubo de la lando estis kiom aktivaj. Ĉiujare estis sumigataj la aktivecoj de E-klubo kaj apartaj esperantistoj. Rezulte poste estis facile kalkuli (ekzemple), kiom da prelegoj pri Esperanto por neesperantistoj okazis dum la jaro, kiom da korespondligoj kun alilandaj esperantistoj estis, kiom da esperantistoj partoprenis en tendaroj kaj diversaj E-renkontiĝoj ktp.

En la agadjaro 1975-1976 dediĉe al la 10-jariĝo de SEJM estis decidite nomumi la 10 la plej aktivajn SEJM-anojn “*Honoraj aktivuloj*” de SEJM.

RESUME

Ĉu vere estis aktiva la laboro de nia organizaĵo SEJM? Pri tio povos poste juĝi niaj posteuloj. Gravas, ke la maltrankviliga agado de SEJM-anoj, konstantaj diversaj petoj kaj proponoj al oficialuloj, leteroj al superaĵ instancoj k.s. sume instigis, ke aperu “sekreta letero” de CK KPSU kaj rezulte marte 1979 okazis Fonda Konferenco de ASE, jam pli oficiala organizaĵo. Ni povas nur konstati – en 1979 komenciĝis nova etapo en la agado de sovetiaj esperantistoj – la agado de alia organizaĵo, ASE. Sed pri tio povas esti alia rakonto...

Dmitrij Cibulevskij (Ukrainio)



Partoprenintoj en SEJT-10 (Altajo, Teleckoje-lago, 1968)

BIOGRAFIARO DE PATROLANDAJ ESPERANTISTOJ: PROBLEMETOJ KAJ SOLVOJ

La 15-an de aprilo en la klubejo de la peterburga E-societo “Kariljono” estis prezentita prelego pri ĉi-supre citita temo. Pri la ĉefaj trajtoj de la studo mi volas rakonti en ĉi artikolo.

Se iu persono deziras verki artikolon pri elstara esperantisto, li serĉas kredindan informon pri tiu. Sed la fama “Enciklopedio de Esperanto” jam ne respondas al modernaj bezonoj. En ĝi la biografiaj notoj pri esperantistoj estas jam neaktualaj kaj ne donas kontentigan scion. Kion fari? El tio venas tute logika konkludo: preni jam pretan konsultlibron biografian. Bedaŭrinde, por hodiaŭ ĝi ne ekzistas. Tamen plu restas demando: ĉu la biografia konsultlibro estas bezonata? Respondo venas: Jes!

Ekzemple nun ĉinaj esperantistoj jam havas slipojn pri 1000 ĉinaj esperantistoj. Nun okazas skrupula kompilada laboro.

Niaj samideanoj el Estonio en 2000 eldonis kompilitan de Jaan Ojalo “Enciklopedion pri la estona Esperanto-movado”. La enciklopedio enhavas biografiojn pri 168 estoniaj esperantistoj.

En Litovio en 2002 estis eldonita 6-voluma historio de “Esperanto en Litovio” kompilita de Mekys Antanas. Ĝi enhavas 222 biografiajn notojn.

En Ukrainio Dmitrij Cibulevskij en 2002 eldonis “Enciklopedion de historio de la E-movado en USSR”, enhavantan boigrafiajn artikoletojn pri 278 esperantistoj. La verko estas kombino de malnovaj informoj ĉerpitaj el “Enciklopedio de Esperanto” kaj propretrovitaj informoj ĉerpitaj de la aŭtoro el diversaj fontoj.

En 2007 J.Vajs eldonis la libron “100 gravaj personoj de la slovaka Esperanta movado”. La broŝuro enhavas informojn pri 80 slovaciaj kaj 20 eksterlandaj esperantistoj.

Nun aktualas demando: kio estas farita en Rusio?

En 2000 aperis skizo de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov “Esperanto en Ruslando”, kies biografia parto enhavas 42 nomojn.

En 2010 ŝvebanta ideo pri kompilado de la (nova) Enciklopedio de Esperanto en Rusio estis prezentita fare de la eldonanto de “Impeto” Aleksandr Ŝevĉenko. Eĉ estis iniciatita provo kompili eldonindan temaron. Kelkaj personoj el labora teamo jam prezentis sian artikoletojn pri revuoj, eldonejoj, personoj ktp. Sed la teamo de libervolaj kompilintoj sukcesis ne multe. Post la morto de Aleksandr Ŝevĉenko ankaŭ la afero ĉesis.

Tamen mi havas iom da neordigitaj biografiaj informoj pri la patrolandaj esperantistoj. Por hodiaŭ (2015) jam estas diversgrade pretaj biografietoj pri 344 esperantistoj. Kiam mi komencis kompili la biografiaron, mi

renkontis kelkajn problemetojn kaj sukcesis solvi ilin.

**La unua demando estas samtempe naiva kaj serioza:
kio estas esperantisto?**

- 1) Ĉu persono, kiu ne posedante Esperanton parkere legas E-versaĵojn, estas esperantisto?
- 2) Ĉu kantistino, kiu ne posedante Esperanton bele trilas Esperantajn kantojn, estas esperantisto?
- 3) Ĉu persono, kiu registras en sia taglibro eventojn de sia krea vivo en Esperanto, estas esperantisto?

Se sekvi enciklopedian signifon, venas respondo: “Jes”, ĉar ĝi notas: “Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga”. Laŭ la signifo ĉiuj tri personoj vualitaj en supraj demandoj estas esperantistoj: se blindulo parkere legas E-versaĵojn, do li estas esperantisto. Kantistino Marija Vozdviĵenskaja (†22.02.1926), kiu prezentis por la publiko E-kantojn, estis esperantistino. Tanejev Sergej Ivanoviĉ (1856-1915), mond-fame konata rusa komponisto, pianisto, eminenta muzik-aganto, kiu skribis taglibron en Esperanto, ankaŭ estas esperantisto.

Pseŭdonimoj

Dum la kompilado mi trovis problemon pri identigo de la esperantistoj, kiuj uzis pseŭdonimojn. Ekzemple estas bone konataj personoj: loĝinta en Saratov fama posedanto de la plej riĉa kolekto de esperantaĵoj en la mondo Davidov Georgij Karpoviĉ (1879-1967) havis originan familian nomon Davidjan: li laŭ nacieco estis armeno. Alia armeno estis la konata Sevak Gurgen Grigorjeviĉ (1904-1981) (= Grigorjan). Laŭ la pseŭdonimo Bonifatij Tornado ni konas fakulon pri E-literaturo kaj poezio Tokarev Boris Vladimiroviĉ (1927-1994). Belorusa pioniro de la porinfana literaturo, konata al ni laŭ la pseŭdonimo Janka Maŭr (= Fjodorov Ivan Maĥajloviĉ) (1883-1971), en la 1930-aj jaroj abunde korespondis per Esperanto, do sendube estis esperantisto. Tutmonde konata etnografo, antropologo, aktiva litova esperantisto Antanas Poška (1903-1992) uzis ĝis 1931 familian nomon Paškevičius.

Por junaj esperantistoj mi volas prezenti personon, kies verko aperis en 1968 kaj estis surtabla libro de ĉiu aktiva esperantisto. Temas pri Ermar Pavloviĉ Svadost-Istomin, aŭtoro de ruslingva libro “Как возникнет всеобщий язык? (Kiel estiĝos tutmonda lingvo?)”. La origina nomo de la aŭtoro estas Istomin Nikolaj Pavloviĉ (1907-1971). La pseŭdonimoj origi-

nas el la nomo de lia patrino **Ernestina Martinovna** = **Ermar** kaj el slo-gano “**svojego dostignu**” = **Svadost**.

Dum la kompilado mi ne sciis kiel prezenti personon konatan laŭ pseŭdonimo: ĉu prefere laŭ la pseŭdonimo aŭ laŭ la origina familia nomo? La problemeton jam delonge solvis kompilintoj de la tutlandaj enciklopedioj. Ekzemple: Stalin (v. Ĝugaŝvili), Lenin (v. Uljanov). Mi solvis tiel: en alfabeta listo estas indiko “Janka Maŭr v. Fjodorov Ivan Miĥajloviĉ”; en la teksto – “Fjodorov (ps. Janka Maŭr) Ivan Miĥajloviĉ...”

Transskribo de familiaj nomoj

Ne estas sekreto, ke esperantistoj mem preferas iom modifi siajn nomojn laŭ Esperanta transliterado. El tio rezultiĝas, ke rusa blinda pedagogo, vojaĝinto, verkisto Jeroŝenko Vasilij Jakovleviĉ (1890-1952) iĝis Eroŝenko. Arĥangelska ĵurnalisto kaj iniciatinto de proleta E-korespondado Jerĵuhin Aleksandr Prokopjeviĉ (1901-1959) iĝis Erĵuhin. Ĵurnalisto Flejs Jefim Manuiloviĉ (1903-1979) iĝis Efim. Malnova esperantisto kaj populariganto de Esperanto Jevstifejev Nikolaj Petroviĉ (1866-1943) iĝis Evstifejev.

Feliĉe E-poetino Jevsejeva Ludmila Ivanovna (1913-1980) restis kun origina transskribo de la familia nomo. (Ankaŭ Sergej Jesenin, Otto Jespersen ktp.).

Mi en mia laboro sekvis la firmiĝintan manieron. Se la nomon oni uzis/-as kun “e”, do mi imitas ĝin; se kun “je”, mi uzas tian “je”-formon.

La urbaj nomoj preskaŭ ĉiam sekvas la “e”-formon: Ekaterinodaro, Ekaterinoslavo, Ekaterinburgo, Erivano ktp.

Sed pli gravan atenton petas transskribo de la nomoj, kiuj post E-transliterado iĝas nerekoneblaj. Ekzemple estis aktiva esperantisto kiu majstre deklamis versaĵojn de Gorkij, Puŝkin k.c. Temas pri *Рытѣков* Nikolaj Nikolajevič (1913-1973), kiu post la nereveno en 1965 el eksterlanda E-konferenco restis en Okcidento kaj mortis en Londono; lia nomo estis prezentita kiel: “Rytĵkov”. Sed kiel transskribi la familian nomon de alia aktiva esperantisto: *Пылѣв* Aleksandr Nikolajevič (1894-1978?): Pylĵov, Pilev? Sed estas granda diferenco inter *Пылѣв* kaj *Пилев*. Mi solvis la problemeton tiel: Rytĵkov (Рытѣков) N.N. kaj Pilĵov (Пылѣв) A.N.

Estas pardoninda la moligo de rusaj virinaj nomoj: Helena el Jelena, Halina el Galina. Sed iam mi trovis nomon de fama E-aganto Demidĵuk Grigorij Prokopjeviĉ (1895-1985) kiel Gregor, ankaŭ kompilinton de granda R-E vortaro Izgur Ilja Juĥimoviĉ (1881-1937) kiel Elio.

Sed tute ŝokas moligo de ukrainaj familiaj nomoj. Ekzemple dum multaj jaroj estis Ĥarkovskij, sed jam aperas Ĥarĵkovsjkij. Tute vane ukrainaj

samideanoj provas molan signon transskribi per “j”, ĉar la nomo iĝas komplike prononcebla.

Pri nacieco de la esperantistoj

Pri la biografia parto de la supre citita verko de H.Gorecka kaj A.Korĵenkov iuj riproĉis, ĉar ne por ĉiu persono estis indikita lia nacieco. Tio estas tute kompreneble: ne ĉiam esploristo povas firme indiki naciecon de iu persono. Laŭ mi: se estas sciata nacieco de esperantisto, do ĝi devas esti indikita.

Pri kontribuo de esperantistoj por Esperanto

Verdire ne ĉiam oni povas kontribui por Esperanto. Estas esperantistoj, kiuj ordinare vivas, babilas, vizitas klubajn kunvenojn, korespondas per Esperanto, de tempo al tempo prelegas ktp. Ĉu tiuj modestaj personoj meritadas esti notitaj en la Biografiaro? Ĉar abundas jenaj ekzemploj:

Bogdanov Ivan (1896 – 6.10.1928). En Ĉerepovec sin pendigis per ŝnuro, pro longa senlaboreco kaj malfeliĉa vivo, malnova esperantisto, s-ano Ivan Bogdanov (32-jara fraŭlo). Ne povis lia doloranta koro toleri la multjaran suferadon en malfacila vivo pro senlaboreco, ne povis la volo deteni lin de tiu malbona penso – morto, kaj li perdis la ekvilibron de siaj fortoj, animo kaj menso, kaj li ekprenis kiel solan konsolon por sia doloranta animo la sinmortigon¹.

Alia kazo estas ĉe jena persono:

Petrov Nikolaj Ivanoviĉ (1939 – 20.03.2004); mortis dum operacio, aktiva esperantisto el Viborg, klerulo kaj instruisto.

Mi scias, ke Petrov N.I. estis aktiva esperantisto, sed mankas informoj pri lia poresperanta agado. Tamen por mi ne estas diferenco, ĉar mankas informoj pri ambaŭ personoj. Oni devas serĉi.

Kion konsideri dum la kompilado?

La demando ne estas hazarda, ĉar estas personoj, kiuj famiĝis ĝuste pro siaj profesiaj agoj kaj malmulte en Esperanto. Ekzemple mi volas prezenti subajn informojn:

Makaŝvili Zurab Aleksandroviĉ (†1998). E-1957. Kandidato pri biologiaj sciencoj, laboranto de la Centra botanika ĝardeno ĉe Akademio de Sciencoj de Kartvelia SSR, pentristo. M. finis kemian fakultaton, sed ĉefe laboris pri biokemio. Aŭtoro de vico da artikoloj pri abelbredado: “Mielo”, “Poleno”, “Propolis”,

¹ *Heroldo de Esperanto*, № 43 (487), 26.10.1928

“Medicina abelbredado serve al homo”, “Konversacioj pri medicina abelbredado”. M. estas aŭtoro de ruslingvaj verkoj “Terminaro pri abelbredado” (1972), “Propolis – natura medikamento” (1977). Eldonis grandan abelbredadajn temajn “Rusa-Kartvela” kaj “Kartvela-Rusa” vortarojn. Estas tradukinto de Ŝota Rustaveli-verkoj: “Aforismoj” (1983) kaj “Kavaliro en tigra felo” (1989). Mortis en Tbilisi.

El la teksto oni komprenas, ke Makaŝvili estas fakulo pri abelbredado, sed liajn E-tradukojn oni ne povas supertaksi. Pro siaj E-tradukoj li menciigas apud Zamenhof, Grabowski kaj aliaj majstroj de la tradukarto! Sed pri Makaŝvili kiel homo kaj esperantisto mankas informoj.

Ankaŭ abundas informoj pri profesia agado de **Ĥovanskij Aleksej Nikolajeviĉ** (1916-1996): li estas aŭtoro de deko da libroj pri matematiko kaj muzikaj verkoj, estis kandidato de fizik-matematikaj sciencoj, docento de Kaliningrada Ŝtata Universitato. Li partoprenis en tutsovetia kongreso de matematikistoj (1961). En la Ŝtata Arkivejo de Kaliningrada regiono estas deponitaj diversaj materialoj kaj E-korespondado de Ĥ. kun ekster- kaj enlandaj esperantistoj. Sed mankas informoj pri lia poresperanta agado.

El du supre prezentitaj ekzemploj venas konkludo: necesas registri ĉiujn por-Esperantajn atingojn de personoj kaj skize prezenti ĉefajn profesiajn fruktojn.

Se iu diros, ke kompili biografieton pri ajna esperantisto nuntempe estas tute simple, ĉar dank’ al Interreto estas konsulteblaj grandaj en- kaj eksterlandaj enciklopedioj, estas adresoj de arkivejoj kaj muzeoj, ke oni povas konsulti Vikipedion kaj ceterajn retejojn, mi diros “jes”.

Sed oni ne forgesu, ke por kolekti informojn pri unu sola persono necesas trafolumi dekojn da E-ĵurnaloj kaj gazetoj, trovi rememorojn de samtempuloj, trarigardi dokumentojn en arkivejoj, ricevi konsilojn kaj konsultojn de fakuloj ktp. Ĉi tie ne estas menciite pri la perdo de tempo, energio kaj mono dum la informkolektado.

Mi persone kompilis abundajn kaj riĉajn biografiojn en la rusa pri dudeko da esperantistoj kaj en Esperanta lingvo pri la dekopo:

Borovko Nikolaj Afrikanoviĉ (1863-1913);
Cvetkova Varvara Petrovna (1910-1999);
Demidjuk Grigorij Prokopjeviĉ (1895-1985);
Devjatnin Vasilij Nikolajeviĉ (1862-1938);
Kazi-Girej Nikolaj Aleksandroviĉ (1866-1917);
Podkaminer Semjon Naumoviĉ (1901-1982);
Postnikov Aleksandr Aleksejeviĉ (1880-1925);
Stojan Petr Evstafjeviĉ (1884-1961);

Seppik Henrik (1905-1990);
Saĥarov Aleksandr Andrejeviĉ (1865-1943).

Verdire la laboro ne estas laŭ miaj fortoj. Estus pli produktive kompili la biografiiaron en teama komuna laboro. Mi vidas la laboron tiel: mi prezentas jam ekzistantan alfabetan liston kun esperantistaj biografietoj. Persono, kiu majstre regas komputilon, estras la aferon en iu forumo: li akumulas ricevitaĵn korektojn, detalojn, datojn ktp. kaj renovigas la dosierojn. Post unu-du jaroj oni povas eldoni la ĉefajn atingojn de la kompilintoj kaj daŭrigi la laboron.

Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburg)

SZYMBORSKA EN “ORIENTO-OKCIDENTO”



Mi inventas la mondon estas la 50-a titolo kiu aperas en la Serio “Oriento-Okcidento”. La kolekto de poemoj de Wisława Szymborska estas ĵus eldonita de Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki.

Wisława Szymborska (1923–2012) estis pola poetino, eseistino kaj tradukistino, kiu en 1996 ricevis la Nobel-premion pri literaturo. Ŝiaj verkoj apartenas al la plej multe tradukitaj en la pola literaturo. En la laŭdparolado ĉe la Nobel-premia ceremonio ŝi estis prezentita kiel “reprezentanto de la nekutima pureco kaj forto de poeta rigardo”, ĉar ŝia poezio estas “respondo al vivo, maniero de vivo kaj laboro pri vorto kiel penso kaj sentemo”.

La 339-paĝa *Mi inventas la mondon* estas la unua poemaro de Szymborska en Esperanto. La poemojn el la tuta periodo de ŝia verkado (1945–2012) elektis kaj enkondukis Wojciech Ligęza, kaj tradukis Tomasz Chmielik, István Ertl, Danuta Kowalska, Lidia Ligęza, Kris Long, Adam Łomnicki, Martyna Taniguchi kaj Włodzimierz Wesołowski. La libron akompanas la teksto de la parolado de Szymborska ĉe la ricevo de la Nobel-premio.

La bele bindita libro estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 20,70 eŭroj. En la Serio “Oriento-Okcidento” diversaj eldonejoj aperigas sub aŭspicioj de UEA verkojn aparte gravajn kaj reprezentajn de nacilingvaj literaturoj. Per la eldonserio la esperantistoj kontribuas al la Programo de Unesko por Reciproka Studado kaj Aprezado de Kulturoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Eksciu, ke...

LA 4-a LERNEJA LINGVA FESTIVALO EN KALUGA

La 18-an de aprilo, sabate, pasis la 4-a Lerneja Lingva Festivalo en Kaluga, kiu naskiĝis helpe de la Moskva Esperanta Asocio MASI (MEA MASI) – organizanto de la Moskva Lingva Festivalo. Ekde tiam MEA MASI estas la konstanta kunorganizanto de la Kaluga festivalo, menciata en ties programo kune kun la Departemento pri klerigo de la urbo Kaluga.

La festivala programo en Kaluga skeme ripetas tiun de la Moskva: la malfermo kun emociaj allogaj anoncoj fare de la lingvaj prezentantoj, la tri blokoj de la lingvaj prezentoj (po 14 samtempaj 40-minutaj programoj en unu bloko) kaj fine – belega koncerto kun enmanigo de la dankfolioj al la instruistoj. Ĉi-foje la dankfoliojn ricevis 11 moskvaj festivalanoj, kiuj realigis 24 el 40 kalugaj programoj. El inter la 11 instruistaj moskvanoj 5 estis esperantistoj-MASI-anoj. Kiel ĉiam, dufoje estis prezentita Esperanto, al la tre atenta kaj dankema juna publiko, vere impresita de la konatiĝo kun la elstara lingva fenomeno kaj ĝia historio.

La festivalo en tiu ĉi fojo pasis en la gimnazio №19, kiu apenaŭ kapablis enloki ĉiujn dezirantojn. La presitaj programoj ne sufiĉis, la seĝoj dum kelkaj prezentoj en niaj klasoj ne sufiĉis. 95% de la vizitintoj estis lernejanoj inter la 5-a kaj 11-a klasoj (11-17-jaruloj), mem elektintaj tiel pasigi la sabatan tagon. Nature estas, ke speciale allogadis ilin la lingvoprezentoj de la samaĝuloj: la 14-jara okklasano Ivan Sapogov (la novgreka lingvo) kaj la 17-jara Kuzjma Smirnov (la klingona kaj la skota) – ambaŭ esperantistoj-MASI-anoj. Dum la prezentado de Esperanto la geknaboj multe demandis pri tiuj ĉi junuloj – iliaj ekzemploj inspiris multajn lerni Esperanton.



***Irina Gonĉarova,
kunordiganto de
MEA MASI,
direktoro de Moskva
Lingva Festivalo,
prezentanto de Espe-
ranto en la Kaluga
Lerneja LF***

NOVA ĜENERALA DIREKTORO: TRI KANDIDATOJ INTERVJUOTAJ

En februaro 2015 la Estraro de UEA anoncis konkurson por la posteno de Ĝenerala Direktoro, celante trovi posteulon por Osmo Buller post lia emeritiĝo en la unuaj monatoj de 2016. La limdato por kandidatiĝoj estis la 31-a de majo.

Ĝis la limdato venis ses kandidatiĝoj. Post plureta diskutado, la Estraro decidis inviti tri el la kandidatoj al persona intervjuo en Lillo, la 24-an de julio, unu tagon antaŭ la komenco de la 100-a Universala Kongreso.

La tri kandidatoj invititaj al intervjuo estas Konrad Andrzejuk el Pollando, Veronika Poór el Hungario kaj Nikola Rašić el Nederlando.

Ni estas kontentaj fronti elekton inter pluraj interesaj kaj kapablaj kandidatoj, komentis d-ro Mark Fettes, Prezidanto de UEA. La intervjuoj donos okazon por pli fundaj diskutoj pri la direktoj, prioritatoj kaj kondiĉoj de la laboro. Ni serĉas homon, kiu povos gardi la plej gravajn tradiciojn kaj trajtojn de UEA, sed ankaŭ kungvidi procezon de renovigo kaj modernigo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

JESPER JACOBSEN GVIDOS IKU EN LILLO

D-ro Jesper Lykke Bannier-Jacobsen estis nomumita de la Estraro de UEA kiel la rektoro de la 68-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kiu okazos kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en la franca urbo Lillo.

D-ro Jacobsen, dandevena fizikisto, estas profesoro ĉe la Universitato Pierre kaj Marie Curie en Parizo. Krom kiel rektoro de IKU, li kunlaboras por la 100-a UK kiel membro de la Loka Kongresa Komitato pri tradukado. Li estis ankaŭ kunlaboranto pri fiziko por la nova eldono de Plena Ilustrita Vortaro.

La ĉi-jara IKU proponos dek prelegojn anstataŭ naŭ kiel kutime. La prelegoj estis jam pli frue elektitaj de la Estraro de UEA laŭ la propono de la Komisiono pri IKU. Iliaj resumoj estas legeblaj en la retejo de IKU <<http://www.uea.org/teko/IKU/2015>> .

Gazetaraj Komunikoj de UEA

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH ATENDAS SUBVENCIPETOJN

UEA disdonas por la dua fojo subvenciojn el la Biblioteka Apogo Maria kaj Johano Bachrich por helpi pliriĝi kolektojn de Esperanto-bibliotekoj.


La komenca kapitalo (20 000 USD) de tiu speciala fondaĵo estis donacita de la gefiloj de ges-roj Bachrich pasintjare. La eminenta venezuela esperantisto Johano Bachrich (1921-2005) estis Honora Membro de UEA kaj longtempa motoro de Venezuela Esperanto-Asocio. Ankaŭ lia edzino Maria (1936-2011) estis esperantisto.

Biblioteka Apogo Bachrich povas subteni Esperanto-bibliotekojn, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco. La subven-cioj estas uzeblaj por akiri librojn aŭ aliajn varojn, kiuj estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30-a de aŭgusto 2015 papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retpoŝte <direk-toro@co.uea.org>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

FORPASIS ANTANAS MEKYS (1917-2015)



La 18-an de junio forpasis en Vilno litova esperantisto Antanas Mekys, Honora Membro de UEA ekde 2003. Li naskiĝis la 17-an de novembro 1917 en la vilaĝo Vilūnaičiai de la distrikto Pakruojis. En 1940 li finis instruistan lernejon en Šiauliai kaj en 1946 la ekonomikan fakultaton de Vilna Universitato, ĉe kiu li lektoris kvar jarojn kaj poste laboris ĉe la ŝtata komitato pri planado ĝis sia emeritiĝo. Pri Esperanto li ekinteresiĝis en 1933, sed serioze li ekstudis ĝin kaj ekaktivis movade en 1959. Ekde 1965 li estis aktiva kursgvidanto.

Mekys preparis kaj gvidis korespondan Esperanto-kurson, kiun finis pli ol 100 personoj. Li verkis ankaŭ tri diversspecajn lernolibrojn: por lernantoj, por klubkursanoj kaj por junularo. Ĉar ne eblis oficiale eldoni ilin, ili aperis samizdate. En la periodo 1971–1973 li verkis gazetan kurson, kiun publikigis naŭ distriktaĵaj gazetoj kun la suma eldonkvanto pli ol 100 000 ekz. Tiu kurso kaj ĝiaj finintoj fariĝis bazo por la organizita movado en la koncernaj urboj kaj distriktoj. En 1972 simila kurso aperis en la tutlitova monata revuo *Moksleivis* (Lerneĵano) en 80 000 ekz., kiu en 1988-1991 republikigis ĝin en 65 000 ekz. En 2001 ĝi aperis ankaŭ kiel libreto kun la nomo *Esperanto – Poŝa lernilo*. En 1974 Mekys verkis kaj surbendigis sonkurson por memlernantoj kaj distribuis ĝin tutrespublike. Tion li faris

propramone, sed lia plej grava lernolibro, la 184-paĝa *Esperanto kalbos vadovėlis*, aperis jam oficiale ĉe la eldonejo Alma Littera en 3000 ekz. en 2001.

Mekys verkis ankaŭ originalan poezion, publikigante la kolektojn *Pardonu min*, Muzo (1997), *Fore de parnaso* (2002) kaj *Labirinto* (2005). Pri siaj spertoj kiel Esperanto-instruisto Mekys rakontis en artikolserio en la revuo *Litova stelo*. La artikoloj aperis broŝurforme sub la titolo *Kiel mi lernis kaj instruis Esperanton* (2001). Mekys esploris ankaŭ la historion de la litova movado, aperigante studojn en ses kajeroj de *Esperanto en Litovio* (1997-2000), i.a. kun la biografioj de 222 litovaj esperantistoj. Sian vivovojon Mekys registris en la rememoroj *Cis morto* (2009).

Kelkaj generacioj de litovaj esperantistoj lernis el la lernolibroj de Mekys. Li estis tute prave estimata de litovaj esperantistoj. Antanas Mekys estis viva ekzemplo de fideleco kaj multjara servado al idealoj de esperantismo, diras Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, pri la signifo de la forpasinto por la litova movado.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

UEA HAVAS JAM PLI DA MEMBROJ OL EN 2014

Kun kresko je 124 membroj UEA haltigis pasintjare la falon en sia statistiko kaj registris entute 5027 individuajn membrojn. Ĉi-jare la nombro kreskas ankoraŭ pli forte kaj jam komence de junio superis la definitivan pasintjaran nombron. La 7-an de junio estis registritaj jam 5050 membroj. Tio estas je 545 pli multe ol en la sama tago pasintjare. La ĉi-jara kresko sekvas ĉefe el la populareco de la 100-a UK en Lillo, al kiu ĝis la komenco de junio jam aliĝis preskaŭ same multe da kongresanoj kiel al la tri antaŭaj UK-oj sume. Tiun t.n. kongresan efikon kaŭzas tio, ke la kongreskotizoj estas malpli altaj por tiuj, kiuj aliĝas al UEA minimume kiel Membro kun Jarlibro. Entute 775 kongresanoj de la Lilla UK ne membris en UEA pasintjare sed kotizis ĉi-jare. Tamen UEA povis bonvenigi inter siaj membroj ankaŭ 380 esperantistojn, kiuj ne aliĝis al UK. Kiu ankoraŭ ne (re)membriĝis por 2015, povas daŭre fari tion. Plej facile tio eblas per la reta aliĝilo <<http://www.uea.org/alighoj/alighilo>>.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

kultúra revuo

*romanfragmento*¹

28

nun, havante la familion, li opiniis, ke liaj internaj ecoj de vera soldato, oficiro, povus malkovriĝi kaj evolui nur en situacio vere milita. La ofikado en Kremlo opresis lin ĝis plena naŭzo, sed li estis ĝisosta soldato kaj ne imagis malobeon al ajna estra ordono.

La dujaran studadon en la Altlernejo li akceptis kiel sian ŝancon ŝanĝi la sorton, rompi la kruston de sia stato, kien lin ekzilis la destino. Ĝuste pro tio li agis laŭ la vaste konata konsilo de Trockij, t.e. “rodís graniton” de la milita scienco, fortigis la korpon per ĉiutagaj trejnadaj, spertiĝis pri ĉevalrajdado, uzo de ĉiuj alireblaj pafiloj kaj eĉ sukcesis altigi sian posedon de la germana lingvo ĝis tre estiminda, preskaŭ senakĉenta nivelo. Kelkaj kolegoj el inter la ontaj ruĝaj komandantoj opiniis lin, la plej altpoentan studenton, sekanima karieristo, sed tio estis nur envio. Lia ĉiama trankvilo, lia senriproĉa honesto, lia helpopreto, des pli lia kapablo prezenti sian helpon sen nepra interesiĝo pri ties bezongrado provizis lin per multaj sinceraj amikoj kaj per senkondiĉa estimo de la plimulto.

Post sia lasta ekzameno, komence de februaro Talis tamen sukcesis por horeto viziti la Palacon de Laboro en Solanka, t.e. aperi en esperantista kunveno. Multis novaj nekonataj vizaĝoj, sed ankaŭ iamaj konatoj ĉeestis kaj ĝoje salutis lian reaperon.

- Ho, kiun ni vidas?! – eksklamaciis la samalta kaj samaĝa Grigorij Demidjuk, brakuminta lin ĉe la eniro en la kunvensalonon. – La revolucia Ruĝarmeo finfine vizitas nin por defendi kontraŭ ĉiaj malamikoj! Saluton, saluton! Kiel vi fartas, kamarado ruĝa komandanto?
- Saluton, Grigorij! – respondis Talis. – La ruĝkomandanto ankoraŭ ne oficialigita. Tamen mi tre ĝojas vidi vin.
- Kial, kial ne oficialigita? – scivolis kelkaj alkurintoj al la ekkrio de Grigorij.
- Nur antaŭhieraŭ mi plenumis la lastan ekzamenon, – diris Talis, iom ruĝiĝinta pro troa atento de la ĉeestantoj. – La diplomon mi ricevos post semajno. Kune kun ordono pri la loko de mia militservado.
- Saluton, Talis! Ankaŭ mi ĝojas vidi vin, – Vera penetris al li tra la amaseton. – Ĉu la ordono povas direkti vin el Moskvo tre foren?
- Mi eĉ revas pri tio, – sincere respondis Talis, kun miro rigardante la elstaran ventreton de Vera.

Ŝi rimarkis lian gapan rigardon.

- Konatiĝu kun mia edzo, mi petas, – ŝi diris. – Slavik, venu, venu! Jen estas li, mia edzo...

Ŝi prenis la manon de la alirinta krispa junulo.

- Semjon, – diris la junulo. – Semjon Altman.

- Mi ĝojas... – diris Talis etendante la manon por manpremo. – Kaj mi

gratulas vin, Semjon. Via elekto estas brila, ĉar tiu ĉi belulino estas enviinda edzino. Ĉu vi estas moskvano? Mi demandas, ĉar mi ne vidis vin antaŭe inter la moskvaj esperantistoj.

- Ne, ne, – ridetis Semjon. – Mi naskiĝis en Ukrainio, sed dum kelkaj jaroj mi loĝas en Leningrado... la lastan jaron – kun Vera.
- Ni venis, ĉar mia onjo estas grave malsana... – sekvis lin Vera.
- Ho, mi bedaŭras, – diris Talis. – Mi memoras kaj ŝatas ŝin. Onjo Nina estas tre ĉarma, transdiru al ŝi mian saluton kaj bondezirojn por ŝia resaniĝo.
- Nepre, Talis, – respondis Vera. – Dankon... Jen do ni venis por revidi la amikojn, kaj bonŝance ankaŭ vi estas ĉi tie...
- Vera, ĉu vi bonvolos prezenti min al tiu ĉi bela oficiro?

La voĉo de Francine venis de post la dorso de Vera, sed tuj aperis ankaŭ la posedantino de la voĉo kun la plej ĉarma el ŝiaj ridetoj, direktita al Talis. Ankaŭ Vera ridetis.

- Do, Talis, volu konatiĝi kun mia bona amikino Fransin'. Ŝi ŝategas altajn belajn virojn, sed, Fransin', vi devas scii, ke ankaŭ la edzino de Talis estas tre ĉarma.
- Fi, Vera! – kun imita indigno paŭtis Francine. – Mi ne dubas, ke tiom elstara viro povas kunvivi nur kun ĉarmega edzineto. Kaj mi tute ne intencas konkurenci kun ŝi. Ĉu vi jam havas infanojn, Talis?
- Jes, – diris Talis. – Knabinecon. Du jarojn aĝan.
- Ĉu knabinecon?! Ho, Talis, mi envias! – krietis Vera. – Ankaŭ mi ŝatus knabinon, sed mi sentas, ke nepre naskiĝos knabo.

Levinte la kapon, Talis ekvidis plian konaton – Drezen staris malantaŭ la rondo, ĉirkaŭanta la militiston, kaj rigardis lin, elokvente zorgante, ke Talis atentu lian ĉeeston. Rimarkinte la renkontan rigardon, li tuj iris al Talis, dirante: “Permesu, samideanoj, permesu!” La homoj flankeniĝis, Drezen ekstaris vid-al-vid antaŭ Talis, etendante la manon.

- Saluton, kamarado komandanto! – li diris laŭte. – Bonan revenon al nia esperantista rondo!
- Saluton, Ernest Karloviĉ, – respondis Talis, forte premante ties manon. – Mi revenis, sed eble tio estas mia adiaŭa vizito. Baldaŭ mi devos foriri al iu konstanta loko de mia militservado.
- Nu, ne diru pri la konstanteco, – ridetis Drezen. – Oficiro estu preta al oftaj transloĝiĝoj. Tamen, dum vi restas en Moskvo, vi povus grave helpi nin. La Esperanto-movadon tutlandan kaj eĉ la internacian.
- Mi pretas... – rediris Talis. – Sed kiamaniere? Ĉu estas sekreta afero?
- Ne nepre, – Drezen denove ridetis. – Viaj geamikoj rajtas aŭdi. Vidu, kamarado Berzinŝ, interkonsentinte kun la gvidantoj de SAT, ni ŝatus

inviti ĉi-jare la kongreson de tiu proleta esperantista unuiĝo al ni, en Leningradon. Vi scias, ke mi havas certajn kontaktojn en Kremlo, do la dokumentoj, prezentitaj de SEU, ricevis jam ĉiujn aprobojn, krom tiu de NKVD¹. La paperoj kuŝas tie, en GPU² pli ol monaton, kaj la instanco hezitas subskribi. Mi povus, certe, mem iri tien. Sed... – li mienigis strangan rideton, – ... sed mi, samkiel ĉiuj, evitas ofte viziti la sidejon de tiu estimata instanco.

- Mi ne scias, ĉu mi povas iel helpi, – diris Talis iom hezite, sed sen embaraso. – Ja mi ne oficas en GPU. Sed ĉeokaze mi provos paroli kun iu konato – almenaŭ por informiĝi pri la nuna stato de la afero.
- Tio taŭgas, – kontente diris Drezen. – Dankon. Informiĝu. Kaj bonvolu poste informi min.

2.

Sportuloj de grandega Moskva Klubo “KOR” (Stadion) kor. k. interŝ. fotojn k. gaz. Kun proletaj sportorganizoj pri piedpilko, volejopilko, korbopilko k. manpilko (laŭn-teniso), Moskvo, Kalanĉevska placo, Klubo “KOR” – Esp.

“Sennaciulo” № 3, 1926

Ritma frapado de trajnaj radoj eniris la vivon de Talis. Jam la duan nokton tiu frapado akompanis liajn pensojn. Restis ankoraŭ du tagnoktoj de trajnumado. Aŭ tri – se estos malbonŝanca la trajnŝanĝo. En la fino de la longa vojo, en la mistera Turkeŝtano, lin atendis la posteno de vickomandanto en montara limgardista taĉmento. La posteno, kredinde, pli vigla, pli proksima al efektivigo de liaj revoj kaj aspiroj.

Mirdza trankvile dormis, brakuminte la etulinon Biruta. Li rigardis ilin kun tenero – la plej karajn homojn en la tuta mondo – kaj la maltrankvilo refoje atakis lian animon. Jes, lia Mirdza estas sana kaj tolerema virino, certe ŝi bezonos ne multan tempon por adaptiĝi en la suda klimato. Sed la knabino!.. Nu... tamen ili loĝos enurbe, ne en la limgardista kazerno. Okdek kilometrojn for de li, sed en normala, pli-malpli komforta loĝejo. Ĉio devas esti en ordo... nur la dormo ial ne venis al li jam la duan nokton. Kial?

Li konfesis al si mem, ke tiu ĉi vojo ne estis atendata aŭ aspirata antaŭe. Tiam, antaŭ la distribuo de ofiklokoj inter la diplomiĝintaj komandantoj, la revoj portis lin pli foren. Al Manĉurio aŭ al la ĉina landlimo, kie daŭre fu-

¹ NKVD (mll. rus.) – Narkomato de Internaj Aferoj

² GPU (mll. rus.) – Ŝtata Politika Administracio – fako de NKVD, anstataŭinta la iaman ĈK (Eksterordinaran Komisionon).

riozis milito, kie liaj oficiraj scioj kaj talentoj kiel suplemento al la kuraĝo, kiun li sentis interne, povus montri sin en plena brilo.

Tamen, lia destinprizorganto, kaŝanta sin ie en la ĉiela alto, kovis aliajn planojn. Kelkajn tagojn antaŭ la solena enmanigo de la diplomoj kaj oficojaj direktivoj Talis estis invitita al sia antaŭlonga ĉefo, iama komandanto de la latvaj fusilistoj Jakobs Peters. Talis iom maltrankviliĝis, ĉar nuntempe Peters okupis tute alian postenon, senrilatan al la okupoj de Talis. Vicestro de GPU – la posteulo de tiu timiga kaj timinda Eksterordinara Komisiono, efektiviganta la ruĝan teroron, proklamitan de la proleta diktaturo responde al la terorismaj fiagoj de la blankuloj. La dekstra mano de Dzerĵinskij, de la “fera Felikso”. Kompreneble, Talis ne havis specialajn kaŭzojn por ia ajn timo, sed la subita alvoko rompis lian trankvilon per amara antaŭsento de eksteratendaj sortoŝanĝoj.

La fortika korpulenta kvardekjarulo Peters renkontis lin plej amike. Post la eniro kaj formala militista saluto de Talis li leviĝis, ĉirkaŭiris sian enorme grandan ofican tablon kaj, proksimiĝinte al Talis, forte brakumis lin.

– Nu, saluton, saluton, fileto! – diris li kun malkaŝa ĝojo. – Delonge mi ne vidis vin, knabo, sed mi estas informita pri via progreso. Estas la kaŭzo ankaŭ por mia fiero, kaj mi gratulas vin!

La ruĝiĝinta Talis ne imagis, kiel li reagu al tiu neformala akcepto.

– Mi dankas, kamarado komandanto... – balbutis li, sed Peters frapetis lian ŝultron kuraĝige.

– Dume forgesu pri la formalajoj, knabo! – diris li. – Ni estas sampatrujanoj, kaj ni ĉiam estis ĉe la sama flanko de la barikado en niaj bataloj. Sidiĝu kaj nomu min Jakobo, mi petas.

– Bone, Jakobo, – Talis obeeme okupis seĝon ĉe longa tablo, perpendiculara al la tablego de la mastro.

Peters ne okupis sian estran apogseĝon. Li ĉirkaŭiris la longan tablon, sidiĝis kontraŭ Talis kaj rigardis liajn okulojn. Talis atendis silente.

– Do ni komencu, – diris Peters post kelktempa serĉado de io en la okuloj de Talis. – Certe, vi scivolas pri la kaŭzo de mia invito, knabo, ĉu ne?

– Certe, jes, – soldatece respondis Talis.

– Aŭskultu do, – Peters ridetis. – Post kelkaj tagoj cent dudek ok junaj viroj ricevos diplomojn de la Altlernejo por Ruĝaj Komandantoj. Speciala komisiito de GPU ĉiujare trastudas listojn de la diplomitoj. Ni devas ja zorgi pri selektado de novaj fidindaj oficiroj por niaj specialaj taskoj. Ĉu vi komprenis?

– Certe, jes, – respondis Talis, – sed mi...

- Stop! – intervenis Peters. – Mi ankoraŭ ne findiris. Tiu komisiito, konsiderante la kriteriojn de la selektado, kiujn mi ne aŭdis por vi, rekomendis ses diplomitojn el la ĉi-jara listo, kiel taŭgajn por nia laboro. Estas nur rekomendo. Poste okazos certa testado, konversacioj diversnivelaĵoj – rezulte el tiu sesopo restos eble duono, aŭ eĉ malpli. Kredu min, knabo, estis vera ĝojo por mi trovi vian nomon inter la rekomenditoj. Mi konas vin, se mi ne eraras, ekde la dekseka jaro, ĝuste pro tio mi decidis inviti vin ekster la testado, kiun vi sendube estus sukcese trapasonta, por proponi al vi militservadon en la vicoj de GPU. Nun vi rajtas paroli.
- Dankon, Jakobo, – diris Talis malrapide, zorgeme elektante la vortojn, – sed mi... mi ne ŝatas kabinetan laboron. Nun mi havas fortojn kaj sciojn, kiuj estus... kiuj estus pli utilaj en la armeo... en realaj militaj agoj, ekzemple, en la Fora Oriento, aŭ...
- Sed kiu diris al vi, fileto, – bruske intervenis Peters, – ke mi varbas vin por kabineta laboro? Tute ne. Ĉu vi volas laboron kun reala danĝero? Vi havos ĝin. Mi proponas al vi komenci vian komandant-militservon en la limgardaj trupoj – tiuj ja apartenas al nia instanco... En la plej malkvieta kaj danĝera el niaj landlimoj. En Mez-Azio – mi militservis tie dum du antaŭaj jaroj. Oni regule informadis vin en via Altlernejo pri la aktuala situacio en la mondo, do vi devas havi klaran imagon pri la laboro, kiun mi proponas al vi. Antaŭ nelonge liberiĝis la posteno de vickomandanto en unu el la limgardaj taĉmentoj. Mi proponas, ke vi enposteniĝu tie, kaj mi ne kaŝu de vi, ke via antaŭulo estas pereinta en batalo kontraŭ banditoj.

Li silentiĝis por momento, atendante reagon de Talis, sed ankaŭ tiu silentis.

- Nu, – daŭrigis Peters, – vi havas kaŭzon por rifuzi. En via dosiero mi legis, ke vi estas edziĝinta, eĉ havas dujaran filinon... Tio ne rajtigas vin elekti lokon por militservo, tamen... mi povas trovi por vi lokon iom malpli danĝeran. Sed vi elektis esti oficiro, Berzinŝ. Sekve mankas por vi lokoj tute sendanĝeraj. Jen estas ĉio, kion mi volis diri.
- Mi konsentas pri Mez-Azio, – diris Talis kun iom da stertoro en la voĉo, rigardante rekte al Peters.
- Mi ne atendis alian respondon, – kontente diris Peters. – Do mi ordonos, ke oni preparu viajn dokumentojn. Vi ricevos ilin kun la diploma. Sukcesan servadon!
- Pardonu, Jakobo, – iom heziteme diris Talis. – Ĉu vi permesos unu demandon?
- Kion? Ĉu pri viaj familianoj? – ridetis Peters. – Ne estas kaŭzo por

maltrankvilo. Por via familio vi ricevos apartamenton en proksima urbo. La familianoj loĝos tie, vi povos viziti ilin de tempo al tempo. En ordo, fileto.

- Pardonu min... – diris Talis. – Sed mi volis demandi ne pri tio.
- Pri kio do?
- Vi scias, ke mi estas esperantisto... en libera tempo mi iom korespondas...
- Ha, vi ne lasis tiun okupon! – mire intervenis Peters. – Nu... bone, dume ne malutilas via korespondado...
- ... do mi aŭdis, ke estas preparata internacia kongreso de proletaj esperantistoj en Leningrado...
- Jes, mi scias pri tio, – diris Peters. – Eĉ pli, la paperoj estas jen sur mia tablo. Iom da hezitoj estas en mia kapo. Ni devas eviti venon de spionoj, malamikaj propagandistoj... – vi komprenas, ĉu ne?
- Mi komprenas, – respondis Talis. – Tamen ja devas veni nur proletaro – laboristoj, eble kelkaj kamparanoj... kelkaj scienculoj. Honestaj homoj. Kaj... kaj eblas kontroli antaŭ permesi eniron en la landon...
- Vi ĉion komprenas ĝuste, – diris Peters. – Senriproĉe. Ni povas kontroli, kaj ni kontrolos, certe. Sed vi ne formulis vian demandon, ha?
- Mi volis demandi, ĉu... ĉu vi subskribos la paperojn? – Talis koncentriĝis por havi la necesan internan kuraĝon. – Mi volis peti vin pri tio.
- Do, Berzinŝ, – Peters elparolis severe. – Ne estas via kompetenteco peti pri tio. Estas ja inter viaj esperantistoj pli altrangaj personoj por peti. La gvidantoj de SEU, ekzemple...

Talis konsterniĝis. Venis en lian kapon horora penso, ke per sia peto li, verŝajne, faris fuŝan servon al la afero. Ŝanĝo de lia mieno estis rimarkita de Peters. Li leviĝis kaj iris al Talis ĉirkaŭ la tablo. Ankaŭ Talis bruske leviĝis. Peters aliris lin, metis la manon sur lian ŝultron kaj diris kun kuraĝiga rideto, daŭrigante la frazon, komencitan antaŭe:

... sed vian peton mi, certe, konsideros. Vi diras, ke venos honestaj homoj, sed mi antaŭ nelonge diris, ke vi estas fidinda persono. Mi ne reprenu miajn vortojn.

3.

Sennomulo: Demandoj de miaj lernantoj

Ni batalis kun blankgardianoj.

*Ĉu oni povas ĉi tie meti **kun**, kiel faris la aŭtoro de la letero? Ne, neniu kaze, ĉar alilandano, laŭsence, povas traduki la frazon tiel: ni batalis kune kun blankgardianoj kontraŭ iu alia. Kaj li estos prava, ĉar la kon-*

*junkcio **kun** signifas konsenton, kunagadon, sed ne kontraŭstaron, sekve, ĉi tie laŭsence oni devas meti ne **kun**, sed **kontraŭ**.*

“Meĵdunarodnij jazik” № 7-8, 1926

Lia unua aprilo en la montaro estis admirinda.

La noktoj refreŝige malvarmaj venadis ĉi tie inside, tuje, unumomente. La ĉieltapiso – nigra kun miloj kaj miloj da stellanternoj, formantaj nekonatajn konstelaciojn, – sterniĝis alte kaj senfine super la kapo. La stellumo estis vaga, malkonstanta, kaj la nigraj rokoj en tia glima lumo ŝajnis misteraj monstregoj, ŝtelirantaj al la taĉmenta bazejo.

Sed poste ĉiam venadis la aŭroroj, vivigantaj la ĉirkaŭajn pejzaĝojn, vekantaj buntan verdaĵon kaj belegajn florojn en la intermonto ambaŭborde de la brua ŝtonplena rivereto. La suno pli kaj pli varmigis la ŝtonegojn, rapide sekigis rosajn larmojn de la aŭroro, kaj diversspecaj serpentoj glitis eksteren el siaj rokfendaj kaŝejoj por kuŝi sentime, aperte, ĝuante la varmon – kaj de la ŝtonoj, kaj de la suno.

Dum monato kaj duono Talis sukcesis kutimiĝi al la lokaj kondiĉoj. Certaj problemoj pri la stomako, turmentantaj ĉiujn nelokanojn ĉe alveno ĉi tien, malaperis per si mem post kelkaj tagoj. Lian haŭton rapide kovris sunbruniĝo, kaj fone de ĝi liaj blondaj haroj ŝajnis preskaŭ blankaj. Mirdza kun Biruta restis en Fergana, liberigita disde basmaĉoj¹ antaŭ kvin jaroj, nun trankvila urbo sen gravaj proviz-problemoj. Talis vizitis ilin intertempe nur unu fojon, sed tiu vizito estis sufiĉa por certiĝi pri sekureco kaj konsiderinda bonfarto de la familianoj inter bonkoraj kaj helpemaj najbaroj-uzbekoj.

Osip Tiĥonov, komandanto de la limgarda taĉmento, estis grandegulo, je kapo pli alta ol Talis. Tiu preskaŭ dumetra kamparano, veninta la Ruĝan Armeon tuj ĉe ĝia formiĝo en 1918, batalis en la Fora Oriento ĝis la fino de la Intercivitana milito. Dek kvar jarojn pli aĝa ol Talis, li akceptis sian novan helpanton kun patreca zorgemo. Ankaŭ kun la taĉmentanoj Talis baldaŭ sukcesis starigi normalajn rilatojn. Dum sia vojaĝo al la familio li sukcesis interkonsenti en la stabejo de Fergana pri ioma pliigo de provizado por la taĉmento. Tio levis estimon de la taĉmento al li eĉ malgraŭ tio, ke li stabiligis kaj longigis la matenajn sportekzercadojn kaj trejnadojn kun armiloj. Li esploris kaŝejojn de la sentineloj ĉirkaŭ la taĉmenta bazejo, defendajn baraĵojn, patrol-itinerojn kaj ĉie aranĝis ne fundamentajn, sed liaopinie bezonatajn ŝanĝojn, kiujn post severa inspektado la komandanto Tiĥonov aprobis per kontenta murmuro. “Freŝa okulo ĉiam utilas, – li diris, – la

¹ *Basmaĉoj (de turka basmak – kaŝataki) – ribelantoj kontraŭ la soveta rego en Mez-Azio (1918 – 1927)*

basmaĉoj ne trankviliĝis dume... do zorgu, zorgu, Berzinŝ. Ĉio estas bona, kio helpas nin kontraŭ la minaco”.

Talis jam spertis, ke la minaco, aludata de la komandanto, ne estas fantoma. La ĉefgvidanto de la ferganaj basmaĉoj, la unuokula Kurŝirmat, fuĝis translimen antaŭ kvar jaroj, sed tie, en Afganio, li daŭre okupiĝis pri varbado de uzbekaj kamparanoj, formado kaj trejnado de basmaĉaj bandoj, obstine atakantaj la apudlimajn teritoriojn de Turkeŝtano. La plej kruela el tiuj bandoj, gvidata de certa Ĥuram-bek, havis konstantan bazejon en la montaro, aliflanke de la landlimo, sed apud la teritorio, gardata de Tiĥonovtaĉmento. Preskaŭ regule, du-trifoje en monato la bando faradis provojn, fojfoje sukcesajn, penetri la sovetian teritorion laŭ interrokaj padoj – por rabi, murdi, perforti, sed ĉefe por timigi kaj subigi la loĝantaron de ĉelimaj kiŝlako¹. Dum sia nelonga servado ĉi tie Talis jam dufoje partoprenis batalojn kontraŭ la homoj de Ĥuram-bek en la montaro. Ambaŭfoje la taĉmentanoj per lerta rezista pafado sukcesis forpeli la atakantojn, sed Tiĥonov ne iĝis trankvila. Li opiniis, ke tiuj du atakoj estis provaj, kun nemultaj atakantoj – nur por esplori lokojn de eventualaj limgardistaj embuskoj kaj padojn por eviti ilin. “Ĥuram-bek estas ruza vipero, – li diris al Talis. – Liaj observantoj en la montaro vidis viajn laborojn, do nun li priflaras ĉiujn ŝanĝojn por prepari seriozan invadon kun partopreno de la tuta bando. Gravaj bataloj ankoraŭ venos. Sendube”.

Talis ne pensis, ke tiuj logikaj supozoj de la komandanto praviĝos tiom baldaŭ. Por la deka horo la dudekduan de aprilo estis planita neevitebla ĉiujara Lenin-leciono por la taĉmentanoj omaĝe al la vica naskiĝdatreveno de la forpasinta popolgvidanto. Tiu plano ne efektiviĝis.

Frumatene, ĉirkaŭ la kvara horo Ĥuram-bek ekatakis la taĉmenton, lokinte kelkajn grupojn de siaj banditoj duoncirkle inter la rokoj. Unu el la grupoj senbrue penetris la kaŝejon kun tri sentineloj. Du limgardistoj estis tuj strangolitaj, sed la tria, kaŝanta sin iom flanke, sukcesis dufoje pafi antaŭ la perejo pro kelkaj banditaj kugloj. La pafoj kaŭzis alarman vekigon de la tuta taĉmento, sed la basmaĉoj jam okupis kelkajn bonajn poziciojn antaŭ la bazejo. Nevideblaj en la matena krepusko, ili dense pafadis kontraŭ la baraĵoj de la taĉmentanoj – ŝajnis, ke la mornaj ŝtonegoj mem elsputas fajron kun kugloj. La limgardistoj respondis, pafante tien, de kie venadis la basmaĉaj pafoj, sed la rokoj estis bona protektaĵo por la banditoj.

– Du mitraloj! – kriis Tiĥonov al Talis tra la pafbruon. – Kaj ĉirkaŭ cent basmaĉoj! Ne malpli!

– Ĉe ni kvin homoj pereis! – respondis Talis. – Tri estas vunditaj! Kiom

¹ *Kiŝlako – uzbeka vilaĝo*

restas? Tridek sep!

- Tridek sep! – konfirmis Tiĥonov. – La najbara taĉmento certe aŭdas! Se ili mem ne estas atakataj, ili venos por helpi.
- Dubinde! – kriis Talis. – Ni mem devas iel elturniĝi!
- Ĥuram-bek ne povu invadi la kiŝlakojn! Ni sendu du homojn kun ĉevaloj suben, al la garnizono! – decidis Tiĥonov. – Dum daŭras la krepusko! Kaj dum la basmaĉoj ne sukcesis sieĝi nin de ĉiuj flankoj! Eble, la senditoj sukcesos reveni kun helpo post du-tri horoj!
- Taŭgas! – konsentis Talis. – Sed mi kun kelkaj homoj provu ĉirkaŭiri la basmaĉojn kaj ataki ilin de malantaŭe! Mi konas bonan padon! Ni prenu unu el niaj tri mitraloj!
- Ĉu vi certas?! – kriis Tiĥonov.
- Absolute! – respondis Talis. – Ni sukcesos okupi la rokon malantaŭ kaj super ili!

Tiĥonov bruske klinis la kapon pro kuglo, fajfinta apude, kaj alkuris pli proksime al Talis.

- Provu do, Berzinŝ, – li diris. – Sed estu singardema kaj gardu la homojn. Ne risku vane, knabo.

La suno glitis supren el post la rokoj, sed la kutima vekiĝo de la naturo kvazaŭ ne okazis. Unu el grenadoj, ĵetitaj de la basmaĉoj, eksplodis ĉe la remizo kun hejtaĵoj, kaj tiu ekbrulis, volvante la ĉirkaŭaĵon per rufeta fumo. Timigitaj serpentoj ne okupis siajn lokojn sur la varmaj ŝtonegoj. Nur la basmaĉoj aktivis en la fumo. Perdinte kelkajn homojn, antaŭ plena sunleviĝo Ĥuram-bek sukcesis sieĝi la limgardistan bazejon, kaj nun la kugloj de ĉiuj flankoj flugis kontraŭ la defendantojn. Komandaj ekkrioj atestis preparadon de atako. Aŭdiĝis ankaŭ henado – la ĉevaloj de la bando estis jam venigitaj de la afgania flanko laŭ pli larĝa pado.

Malpli ol tridek batalkapablaj homoj restis je la dispono de Tiĥonov. Li distribuis ilin cirkle. Unu mitralo defendis la sudan, la alia – la nordan flankon. Kune kun la pafiloj ili kapablis redukti la atencojn de Ĥuram-bek, sed Tiĥonov sciis, ke tujan atakon de la tuta bando li ne sukcesos haltigi. Kaj li sciis, ke Ĥuram-bek pretigas siajn homojn ĝuste al la decida atako de ĉiuj flankoj.

Subite la basmaĉoj ĉesis pafadi. Ankaŭ la limgardistoj ne pafis, ŝparante kartoĉojn. Obtuzo silento sterniĝis ĉirkaŭe por kelkaj minutoj. “Ili enseliĝas” – pensis Tiĥonov.

Subite unu raŭka ekkrio rompis la silenton, ĝin subtenis amasaj sovaĝaj kriegoj. La basmaĉoj surĉevalaj kaj piedkurantaj aperis de ĉie, kaj, certe da ili estis pli ol centoj, kaj ili impetis al la baraĵoj de la bazejo. La defendantoj ekigis pafadon, sed tio ne haltigis la sovaĝan amason. Nur tridek aŭ

kvardek metroj restis inter la atakantoj kaj atakatoj. Kaj tiam de sur alta roko haste, laŭte ekklukis mitralo. La kugloj flugis al la banditaj dorsoj, faligante la rajdistojn kaj la kurantojn. La atako haltis. La kurantoj falis teren, rampante al proksimaj ŝtonoj, la rajdistoj direktis la timigitajn ĉevalojn for de la baraĵoj. Tiĥonov vidis ke, obeante kurtan ekraŭkon de Ĥuram-bek, kelkaj basmaĉoj haste ekrampis al la pafanta roko, kaŝante sin inter ŝtonegoj. Kaj estis nenia eblo averti la homojn sur la roko.

Ĥuram-bek aperis de trans roko sur prancanta ĉevalo. La kuŝantaj banditoj post lia ekraŭko obeeme ekrampis al la baraĵoj. La restintaj rajdistoj grupiĝis ekster la zono atingebla por kugloj, evidente por denove ekataki. Tiĥonov vidis, ke Ĥuram-bek levis la manon kaj ŝvingis ordone. La rajdistoj ekimpetis antaŭen. La mitralo de Talis denove ekfunkciis, haltigante ilin, sed tiumomente aŭdiĝis eksplodo, kaj super la pafanta roko leviĝis bulego de fajro kaj fumo. Poste Tiĥonov aŭdis kelkajn pafsonojn, venintajn de tie. La mitralo de Talis silentis. La rajdistoj de Ĥuram-bek kelkminute meditis, sed poste, kuraĝigitaj de lia kolera ekkrio, denove ekimpetis antaŭen. Post ili ekkure leviĝis ankaŭ la piediraj basmaĉoj. Kiam la basmaĉa kavalerio estis tute apud la baraĵoj, Tiĥonov leviĝis por ordoni rajdan kontraŭatakon, uzante dek unu ĉevalojn, restintajn en la bazejo. Sed subite de sur la roko denove aŭdiĝis klukado de la mitralo, faliganta la basmaĉan aron. Ankaŭ de la vojo, gvidanta suben al la montpiedo, eksonis krioj kaj frapado de hufoj – la suba garnizono iris helpe. Tiĥonov vidis, ke la kugloj de sur la roko faligis multajn rajdistojn de Ĥuram-bek, ankaŭ tiu mem strange kliniĝis ensele, verŝajne vundita. Kun la resto de la bando li haste retiriĝis en la montaron.

La vickomandanto Berzinŝ estis trovita senkonscia pro multaj vundoj ĉemitrale sur la roko inter du mortaj limgardistoj kaj sep kadavroj de basmaĉoj. Oni transportis lin al la milita hospitalo en Fergana. Dek sep obuspecoj estis eligitaj el lia korpo. Post kvin semajnoj li estis sendita Moskvon por riparo de la frakasita ŝultro. Dum la restado en moskva hospitalo oni informis lin, ke li estas honorita per la ordeno de la Ruĝa Standardo.

La VI-a SAT-kongreso honorata per speciala poŝtmarko

Tio ne okazis iam en la historio de nia movado!

Kongreslando aperigis honore al Esperanto-Kongreso specialan poŝtmarkon!

Tiu informo estas apenaŭ kredebla... kaj tamen ĝi estas fakto: la bildo ĉi apuda reproduktas ĵus aperintan en Sovetio specialan poŝtmarkon honore al la VI-a SAT-Kongreso!

“Sennaciulo” № 43, 1926



Post *Pri homoj kaj verkoj*, aperinta en 2012, UEA eldonis novan kolekton de verkoj premiitaj en la branĉo Eseo de la Belartaj Konkursoj, starigita memore al la itala esperantisto Luigi Minnaja. La eseoj de la unua volumo temis pri la Esperanto-kulturo, dum la nova kolekto, *Interlingvo inter lingvoj*, prezentas tekstojn pri lingvo kaj lingvaj demandoj, aperintajn en la periodo de 1979 ĝis 2012. Tiu temkampo estis ĉiam populara inter la konkursantoj, pro kio rezultis libro duoble pli dika (271 paĝoj). Ankaŭ la nova kolekto estis redaktita de Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari, respektive la prezidanto

kaj la sekretario de la Belartaj Konkursoj.

Inter la enkonduko de Tonkin kaj postparolo de Carlo Minnaja aperas dek ses eseoj. Tri aŭtoroj reprezentigas per pli ol unu verko. Christian Rivière kontribuis eĉ per kvar: *Vortfarado kaj radikfarado*, *Tamen kompreni: Rolo de la kunteksta redundanco*, *Mezuro de informo-kvanto kaj La pluralo*. Sten Johansson estas la aŭtoro de *Ĉu fundamenta evoluo aŭ neologisma glosolalio?* kaj *Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj*. Ankaŭ el la plumo de Bernard Golden devenas du eseoj: *La sŭahila lingvo kaj Esperanto – komparo kaj kontrasto* kaj *Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj*. La aliaj verkoj en *Interlingvo inter lingvoj* estas *Komo* (Marie Bartovská), *La lingvaĵo de porinfana literaturo* (Zsuzsanna Csiszár), *Lingvo kaj dialekto* (Geraldo Mattos), *Leksikaj novismoj kaj neologismoj: Anatemi aŭ odi?* (Aleksandro Melnikov), *Niaj verboj sen vepro* (Gonçalo Neves), *Digrafio: Speciala kazo de rilato inter lingvo kaj skribo* (Nikola Rašić), *Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado* (Jan Werner) kaj *Kiom da ĉina en Esperanto?* (Xu Daorong).

Fine de sia analiza antaŭparolo Tonkin resumas la mesaĝon de la esearo: *Esperanto estas ne nur lingva fenomeno sed ankaŭ fenomenaj lingvoj. Ni studu ĝin, ni analizu ĝin, kaj ni utiligu ĝin konscie kaj konsekvence. Alproprigante eldiron de alia eseisto fama, Samuel Johnson, ni diru, ke tiu kiu laciĝas pri Esperanto, laciĝas pri la mondo.*

Interlingvo inter lingvoj estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA por 15,00 eŭroj. Ĉe samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj oni ricevas trionan rabaton. La prezo de la antaŭa volumo, *Pri homoj kaj verkoj*, estas 9,00 eŭroj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Nikolao Neĉajev (Irkutsk)

ANGARA BORDO

La bordo krutas,
La bordo altas.
Mi venton glutas,
La koro artas.
Mi venton spiras,
Min logas foro.
Mi versen iras,
Al metaforo.

BAJKALO ATENDAS VIN

Vi ĵus ĝuis Salan maron,
Vin atendas Dolĉa mar'.
Revizitu la tendaron
Nia Verda Amikar'.
Vivu kore maro Nigra,
En memoro, en kronik'.
La popolo Verda, Migra
Venu ree al larik'.
Renkontiĝo de Amikoj
Ree vivu ĉe Bajkal',
Apud laroj, sub larikoj,
Kun mondpaca ideal'.

ĜIS REVIDO

Mia koro plenas je angor'.
Ĝis revido, tajda plora ror',
Laro, roko, rozkolora flor'.
Ĉerpos mi plenmane el memor'
Belon por poeta verslabor'.

IKARO

Loto de poetoj estas revo.
Logas foren min lazuro alta.
Lokon mian lasos mi ikare,
Lofan venton kaptos miaj aloj.
Loĝos mi en alto apud laroj.
Lornon havu, vidu mian flugon.

EsPrimo-11



Por la jubileo de V.V.Samodaj

Vladim Vladimiĉ Samodaj,
ĉu vi enuas en Belgio?
Ĉu ne forgesis malgraŭ ĉio
kaŭzetojn por komuna gaj’?

Jen estas unu: la juni’
alportis vian jubileon.
Do ekjubilu kune ni,
kaj kune verŝu gaj-oleon
en fajron de l’ daŭranta viv’
por ke ĝi brulu senriproĉe,
por ke la juno, la kreiv’
encerbe restu kaj envoĉe,
por ke la vila amikec’
neniam venu al kalviĝo,
por ajna plag’ de ajna spec’
ne baru vojon al feliĉo.

En mia netrobonhumor’
min ja varmigas la konscio,
ke plu funkcias via kor’,
ne elĉerpiĝas la fervor’
kaj ne perfidas la memor’ –
mi kore dankas vin por tio!

Nur okdek jaroj – infanaĝ’!
Do bondeziru mi laŭjude,
ke vi aspiru kun kuraĝ’
almenaŭ l’ aĝon de cent dudek.
Kaj gaje glason tuŝu glas’,
tostante je l’ fortuna dono,
kaj ripetiĝu la okaz’
dum multaj jaroj.

Bruna Ŝtono.

17.06.2015, Tihvin

